

BELGA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

Oficiala Organo de la Belga Ligo Esperantista

REDAKCIO :

Oscar VAN SCHOOR
20, Vondelstraat
ANTVERPENO



ADMINISTRACIO :

Frans SCHOOFS
45, Kleine Beerstraat
ANTVERPENO

ENHAVO : Konkurso Conscience. — Universala Esperanto Asocio. — La Kvina Brita Esperantista Kongreso. — Humila Averta. — Belga Kroniko. — Eksterlanda Kroniko. — Asiria Reĝo Asarhadono. — Bibliografio. — Novaj Libroj kaj Ĵurnaloj. — Diversaj Informoj. — Koresponda Fako. — Gratuloj. — Humoraĵoj. — Historio de Esperanto (daŭrigo).

UNU NUMERO : Fr. 0.40 = Sm. 0.16

ANTVERPENO

— 1912 —

Kaheloj — Fajencoj

Majolikoj

Firmo **L^S JANSSENS**

15, Vleminckveld

TELEFONO 3474 ANTWERPEN

Brikoj por fasadoj

“Van de Loo,”

blankaj, flavaj, ruĝaj, terkoloraj, ledkoloraj k. t. p.
konservas siajn kolorojn kaj necedas en ĉiuj
ajn eksperimentoj.

Pavimoj “Heureka,”

imitantaj la linoltolon, sed sen interspacoj, kaj tial
persistaj, daŭreblaj kaj facilaj por la purigado.

ONI RENOVIGAS LA ELUZITAJN STUPAROJN,
PANISTAJN BENKOJN, MAGAZENAJN TABLOJN
K. T. P.

Specimenoj, planoj, projektoj n° 300 estos
sendataj senkoste kaj sendevige je mendo de
la klientoj.

EKSLUZIVA VENDADO DE
ORIENTAJ PRODUKTAĴOJ

Gabriel FRANCK

ANTWERPEN

32-34, Van Dyckstraat
apud la Parko

**Veraj Orientaj
Tapetoj**

*La deveno de tiuj komercaĵoj
estas garantita.
Oni fabrikas laŭ mezuro kaj skizo.*

33

Aĉetado kaj Vendado de okazajlibroj

JOS. SOLY

LIBRISTO

11, SINT JORISPOORTSTRAAT,
ANTWERPEN

48

BELGA ESPERANTISTO

Aperas proksimume je la mezo de ĉiu monato. Ĝi estas la oficiala organo de la BELGA LIGO ESPERANTISTA. Ĝi enhavas diversriĉan materialon kaj estas redaktata nur esperante. Ĝi havas regulajn korespondantojn kaj kunlaborantojn en ĉiuj belgaj urboj kaj en multnombraj fremdaj landoj.

— Ĝi konsentas specialajn kondiĉojn por la grupoj kiuj abonas ĉiujn siajn membrojn.

Fremdlandaj korespondantoj

D-ro LEON ROSENSTOCK	Krakow, (Polujo)
JOHN LUNDGREN	Hedemora, (Svedujo)
F-no ADELA SEFER	Londono, (Anglujo)
F-no M. WHITE	Edinburgo, (Skotlando)
D-ro G. JAMESON-JOHNSTON	Dublin, (Irlando)
H. TH. THOMSEN	Kristiania, (Norvegujo)
ARGUS	Berlin, (Germanujo)
PENKO STOJEV	Trojan, (Bulgarujo)
D-ro P. STANISIC	Vinkovci, (Kroatujo)
JULES WOLF	La Chaux de Fonds, (Svisujo)
B. F. SCHUBERT	Washington, D. C. (Usono)
MARIUS D'ALMEIDA (BEMALDO)	Lisbono, (Portugalujo)
JULES DE BULYOVSZKY	Budapest, (Hung)
J. AIZIERE	Alfortville, (Francujo)
EM. J. NICOLAŬ	Bukureŝto, (Rumanujo)
D-ro AMBROSIO VARGAS	Meksiko
GIUSEPPE CALZA	Genova, (Italujo)
E. R. HAYHOW	Cape Town, (S. Afriko)
ARTHUR E. BARRINGTON	Benalla, (Victoria)
ELEUTERIO ROSARIO CAMPO	Porlamar, (Venezuela)
PAUL V. IDOYAGA	Montevideo

L. ANTHONIS

23, Arenbergstrato, — Antwerpen

LA PLEJ GRANDA ARO

DA

◀ Fortepianoj ▶

BELGA ESPERANTISTO



MONATA REVUO



Oficiala organo de la Belga Ligo Esperantista

Redakcio :

OSCAR VAN SCHOOR
20, VONDELSTRAAT
(20, rue Vondel)
ANTVERPENO

Administracio :

FRANS SCHOOF
45, KLEINE BEERSTRAAT
(45, rue de la Petite Ourse)
ANTVERPENO

Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendadas. — La Redakcio konservas por si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.

Konkurso Conscience.

Belga Esperantista ricevis la sekvantajn verkojn por la konkurso Conscience.

- 1a kun devizo = Li lernigis sian popolon legi.
- 2a » » » Espero en Esperanto.
 - 3a » » » Amiko de la vero.
 - 4a » » » ? ! .
 - 5a » » » P. olicano.
 - 6a » » » Os. As. Is.
 - 7a » » » Ĉiu estas la infano de siaj klopedoj.
 - 8a » » » Al ni la estonteco !
 - 9a » » » Per perfekta interkonsento ĝis la venko.
 - 10a » » » 7a.
 - 11a » » » Crabio.
 - 12a » » » Arbara hejmo.
 - 13a » » » Nur antaŭen !
 - 14a » » » Esperantujo estas nia patrujo.
 - 15a » » » Amu unu la alian.
 - 16a » » » Nur antaŭen.
 - 17a » » » En Venezia gondolo.
 - 18a » » » Al vi.
 - 19a » » » Vivu Esperanto !

La juĝantaro nuntempe legas la verkojn kaj en la septembra n° de nia ĵurnalo ni publikigos la rezultatojn.

Ni eble publikigos ĉiujn tradukaĵojn, kune kun vivpriskribo de H. Conscience en la oktobra aŭ novembro n° de Belga Esperantisto.

B. E.

Universala Esperanto-Asocio (U. E. A.)

Kiel la lastan jaron, UEA. faris statistikon de la servoj plenumitaj de la Delegitoj dum 1911. Jen la kompara stato de la servoj dum 1909, 1910 kaj 1911 :

Komerco :	1909 :	1120	1910 :	1513	1911 :	2698
Junuloj :		218		402		528
Turismo :		650		631		1258
Servoj al vojaĝantoj :		628		1110		1704
Diversaj servoj		940		3750		4293
<u>Sumoj :</u>		<u>3556</u>		<u>7402</u>		<u>110475</u>
Nombro de la korespondadoj						
de la Delegitoj :		5754		16651		19075
de la Centra Oficejo :		—		23940		34355
Gazetartikoloj pri UEA.		326		6063		363
Paroladoj pri UEA.		218		464		547
Esperantaj kursoj :		—		739		1036
Partoprenantoj de la						
Esp. kursoj :		—		11941		16530

Lau ĉi tiu tabelo oni povas konstati regulan kreskadon de la faritaj servoj.

La stato de la Esperantianoj je la julio 1912 estis la jena : 8282 membroj (maksimumo ĝis nun atingita), 300 Esperantiaj Entreprenoj ; 430 membroj de Interŝanĝa fako ; 86 membroj de Laborista fako ; 128 membroj de la virina fako.

La tria kongreso de UEA. okazos en Krakovo dum la Oka Kongreso Esperantista. La kosto de la kongreskarto estas 2. — Sin. Helpkongresanoj, kiuj ricevas la kongresdokumentaron pagas 1 Sm.

Por faciligi la veturadon al la kongreso, UEA. aranĝos du karavanojn laŭ la jena vojo : Unu karavano foriras el Parizo la okan de aŭgusto kaj tra Nancy, Strassburg, Karlsruhe, Stuttgart atingos München la 7-an. Alia karavano foriros el Lyon la 6-an de aŭg. kaj tra Geneve, Bern, Zürich, Lindau atingos München la 7-an. En München ambaŭ karavanoj kunigos, vizitos la urbon kaj foriros la 9-an tra Salzburg al Wien. La 10-an okazos vizito de Wien kaj la 11-an alveno en Krakovo.

La personoj, kiuj deziras detalajn informojn pri tiuj karavanoj, estas petataj sin turni al la karavanestroj : Sro. L. Poncet, 78 rue de l'Hotel de Ville — Lyon; kaj Sro. M. Genermont, 71 rue Monge — Paris aŭ al la C. O. de UEA., de kiu ili ricevos dum julio cirkuleron kun detalaj informoj pri la horoj, prezoj ktp.

Jus aperis la 1-a aldono al la oficiala jarlibro de UEA., kiu enhavas ĉiujn adresojn de novaj Delegitoj, ŝanĝojn ktp. Ĝi estas necesa al ĉiuj personoj ofte uzantaj la servojn de UEA. (Prezo 10 SD.)

(Oficiale komunikita).

La Kvina Brita Esperantista Kongreso

Niaj britaj Samideanoj kunvenis tiun ĉi jaron en la bela verda Irlando. Ĉar la britaj naciaj kongresoj jam okazis en Anglujo, en Skotlando kaj en Kimrujo, oni decidis montri al la mondo ke nia kara lingvo progresas ankaŭ en la Insulo de Sta Patricio. La elektita kongresurbo estis Portrush, marbanurbo kiu kuŝas je la nordo de Irlando en la Graflando de Antrim kaj en la Provinco de Ulster, proksime de la fama « Giants Causeway » (la Ŝoseo de la Giganto).

La Kongreso estis sukcesa. Lord Aberdeen, Vireĝo de Irlando afable akceptis la titolon de altprotektoro, kaj la Rektoro (Provost) de la Universitato de la Sta Triunuo en Dublin, la titolon de Patrono de la Kongreso. Sabaton la 26an de Majo la loka Komitato akceptis la kongresanojn en la Urbdomo de Portrush kiu estis al la dispoŝo de la Kongreso dum la tri tagoj. Dro J. C. Martin, la Prezidanto de la Portrusha Grupo faris bonvenan paroladon al la vizitantoj. Post ekskurso al la Ŝoseo de la Giganto, okazis vespere en la Urbdomo, tre sukcesa propaganda kunveno. Inter la oratoroj oni precipe aplaudis Kolonelon Pollen, S-ro Bolingbroke Mudie, la Prezidanto de la Brita Esperantista Asocio, kaj S-ro Jameson Johnston de Dublin.

La dimanĉon okazis Diservo en la Preĝejo de la Sta Triunuo je la 10a matene. La preĝoj, himnoj kaj prediko, estis en Esperanto. La predikanto estis la Reverenda R. P. Meredith kiu flue parolas esperante.

Vespere la Diservo okazis en la Metodista Kapelo, kie pluaj samideanoj parolis al la ĉeestantoj esperante.

La labora kunveno de la kongreso okazis lundon en la granda halo de la Urbdomo. Oni pritraktis tre gravajn temojn pri Internacia propagando k. t. p. kaj poste sendis dankajn telegramojn al Lord Aberdeen la Vireĝo, al Sir Vezev Strong, eksurbestro de Londono kaj simpatian telegramon al la familio de la tre bedaŭrita S-ro W. Stead, dronita en la ŝippereo de la *Titanic*.

La nova Prezidanto de la B. E. A. inaŭguracias sian funkcion per la malavara donaco de £ 100 = mil ŝpezimoj, por propagandaj servoj.

Merkredon multaj el la kongresanoj vizitis Dublin kie S-ro Mudie faris paroladon en la fama « Regents house hall de la Universitato », antaŭ la Rektoro kaj multaj Profesoroj de tiu konata ĉeflernejo.

La ĝenerala opinio estas ke la sukceso de la Irlanda Kongreso egalas tiun de la 4 antaŭirantaj britaj kongresoj, pro tio ni kore gratulas la ageman lokan komitaton. La proksima brita kongreso okazos en Eastbourne, Sussex.

A. R.

Humila Averta

De tempo al tempo mi havas la okazon ĉeesti babilad-ojn inter eminentaj esperantistoj. En la lastaj tagoj mi sukcesis kapti grandan sekreton: ŝajnas, ke dum unu el la proksimaj dimanĉoj okazos en Bruselo kunveno de la Liga Komitato, kiu estos treege grava!! Ĝis nun estus jam 21 temoj preparotaj. Ŝajnas ankaŭ ke la prezidanto de la Ligo intencas enkonduki novan arangon por la komitatkunvenoj, kiuj, kiel oni scias, okazas dimanĉe. Ordinare oni havas unu kunsidon kiu komencas je la 10a matene kaj daŭras ĝis plenumo de la tagordo. Evidente estas, ke dum tiuj kunvenoj oni regule malŝparas la tempon en la komenco. Kiam la delegitaro devas ankoraŭ ekzameni 3 aŭ 4 temojn, estas ĝenerale la 1-a h. posttagmeze, kaj ĉar ĉiuj ĉeestantoj ekmalsatas (kelkaj el tiuj malfeliĉuloj forvojaĝis jam tre frue el sia urbo) ĉiuj diskutoj estas rapidege faritaj kaj ĉiuj decidoj urĝege eĉ iom konfuze prenataj. Ŝajnas do ke la prezidanto volas enkonduki novan sistemon. Li konsideras ke, ĉar la grupoj elspezas multe da mono por kaj pro la Ligo kaj pro la komitataj kunvenoj, ĉi tiuj kunvenoj devas esti proporcie fruktodonaj kaj li do proponas komenci la kunsidon je la 10-a. fermi ĝin je la 1-a, por permesi ke la delegitoj tagmezmanĝu, por ke ili, kun « novaj fortoj » povu rekomenci « trankvilan » laboron je la 3a; la dua kunveno de la komitato finiĝos je la 5a. Persone mi nur povas aplaŭdi la intencon de la prezidanto, sed oni ankaŭ permesos al mi, humila batalanto, fari malgrandan rimarkon: mi tute ne estas certa ĉu la delegitaro estos ankoraŭ sufiĉe multnombra dum la posttagmeza kunsido. Multe da delegitoj prave diros ke ili ne povas ĉeesti tiun parton de la kunveno, ĉar ili devas ree esti en sia urbo pro aferoj aŭ pro familiaj kaŭzoj.

Pro tio mi permesas al mi peti la grupojn, ke ili sendu al kunvenoj de la Komitato Liga nur delegitojn, kiuj promesas kaj estas antaŭe certaj ke ili povas plenumi la tutan laboron kiun la societoj kaj la Ligo de ili postulas. Ili do sendu nur personojn, kiuj povos ĉeesti la du partojn de la kunveno.

Mi atentigas la grupojn kaj la delegitojn pri la jenaj para-grafoj de la regularo de nia Belga Ligo: « La komitato povas voĉdoni nur se almenaŭ la duono de ĝiaj membroj ĉeestas la kunvenon », « Se iu delegito ne povos ĉeesti en ia kunveno de l' komitato li devas sin anstataŭigi laŭ reguloj difinitaj de l' grupoj mem ».

Ke ĉiuj aliĝintaj societoj faru do la necesajn arangojn por ke oni ne risku bedaŭri tro malfrue ke la bonvolemaj kaj agemaj delegitoj estu devigataj ĉesi sian laboron pro neĉeesto de kelkaj el la kunkomitatoj.

BARGOF.

BELGA KRONIKO

Ni insiste petas ĉiujn grupojn kaj ankaŭ la disajn samideanojn, ke ili sendu, kiel eble plej akurate, informojn pri sia societo aŭ ĉiuspecajn sciigojn pri Esperanto, plej malfrue la 25an de ĉiu monato, al « Belga Esperantisto », 20, Vondelstraat (rue Vondel), Antwerpen (Anvers). Tre danke nia redakcio ankaŭ ricevos la ĵurnalojn, enhavantajn artikolojn pri nia movado.

ANTWERPEN. — La Verda Stelo — Dum sia ĝenerala kunveno, en kiu ĉeestis 35^o da membroj, tiu vigla grupo preparolis la Gentan Kongreson. Post la raporto, verkita de la Sekretario, oni tre laŭdis la Organizan Komitaton kiu tiel brile sukcesigis la 4an Belgan Kongreson, sed samtempe oni tre bedaŭras ke la elekto pri ses komitatoj por la Belga Ligo, jetis malhelan makulon sur tiun belan Kongreson. La ĉeestantaro decidis kunvoki specialan kunvenon de ĉiuj antverpenaj partoprenintoj por komune pristudi la necesajn rimedojn por arangi la situacion.

Jaŭdon, 27an de Junio finiĝis la dua kurso de la nuna jaro. La profesoro S-ro Fr. Schoofs, alparolinte siajn lernantojn, instigis ilin al daŭrigo de iliaj priesperantaj studoj, al praktika uzado de nia kara lingvo kaj al vigla kaj senlaca propaganda por nia nobla celo. F-ino M. Klingelhoets, je la nomo de la lernantoj, kaj S-ro L. Van de Voorde, je la nomo de la grupo varme dankis la lertan profesoron.

La Julia ĝenerala kunveno okazos merkredon la 24an je la 8 1/2 vespere en la sidejo « Zomerhof », Dageraadsplaats, 30.

LEONO

GENT. — Sabaton, 29an de Junio, je la 9a vespere, S-ro Van Eecke, lernejestro de Genta komunuma lernejo kaj diplomita profesoro de Esperanto malfermis novan kurson en tre grava Societo « Van Crombrugghe's Genootschap », Achterlei, en kiu tridekkvin lernantoj ĉeestis. Niajn plej korajn gratulojn kaj dankojn al la nova sindonema propagandisto.

E. C.

VERVIERS. — La 19an de majo, ĉe la Verda Stelo, S-ro Henri Stembert faris la paroladeton pri la « Societo por la Defendo de la Fagne ». Nia samideano ricevis grandan sukceson.

La 10an de junio, S-ro Ernest Lange komencis ĉe la « Geflegistoj » esperantan kurson, kiun sekvas ĉirkaŭ kvindek membroj.

La 23an de junio, multaj membroj el la Esperantista Grupo kaj el la Verda Stelo kunigis en Sart kun membroj el la Spa'a Grupo, kaj faris ekskurson al la bela rivereto « La Hoëgne ».

Oni tre bone amuziĝis kaj oni jam decidis fari trian ekskurson al la Gileppe, la 4an de aŭgusto kun la Ahena grupo. Tre certe, tiu projekto ricevos ankaŭ grandan sukceson.

JOS. PIRNAY.

EKSTERLANDA KRONIKO

Anglujo. — Nun alvenas la somera sezono en kiu oni ne plu en ĉambro faras paroladojn, sed kiam oni sub ĉiele promenadas kaj faras belajn ekskursojn, gaje parolante esperanton. Tia ekskurso okazis lastan monaton (majo). La Londona klubo elektante la plej belan sunoplenan tagon de l' monato, iris al *Kew* (diru kju), botanika ĝardenego tie nomata, kaj ĝuis tie 183 samideanoj belegan promenadon, finantan per teo, kaj belan enĝardenan koncerton. Novaj Grupoj stariĝis en Rugby kaj en West-Leeds (socialista grupo). Pli ol 50 neesperantistaj ĵurnaloj citis favore Esperanton dum la lastaj kvar semajnoj.

Nova Angla klubo por internaciaj instruistuloj nomata «The nobodies» (la neni uloj) fondiĝis, kaj al tiu, Pola samideano, D-ro Bhizicky estis permesata paroli pri Esperanto dum malmultaj minutoj, en kiuj li antaŭmetis la esencon de nia movado. Esperanto kurso do komencis en tiu klubo, kies devizo estos: Paco, progreso, frateco kaj humaneco.

La oka nacia Packongreso, okazis en Majo: tiel S-ro Kol. Pollen kaj S-ro Mann estis la elektitaj delegitoj de l'Londona klubo, kaj ili parolis fervore pri nia afero. La prezidanto de l'kongreso konsentis, ke esperanto helpos la pacmovadon; li diris ke la unuiĝo de Eŭropo ne plu estas nur afero inter diplomatoj kaj registaroj, sed ke ĝi fariĝos unuiĝo ankaŭ de l'popolo en la tempo kiam Esperanto estos libere uzata inter la nacioj. Alia nova klubo fondiĝis en Londono: «la Cosmopolitan Club» kiu celas faciligon de socia interkomunikado, kaj reciproka interkompreno de l' studentoj de diversaj racoj en la Universitatoj en Londono. Tiaj jam ekzistas multaj en la ĉeflandoj urboj de Eŭropo. Kolonelo Pollen, kiu ĉeestis, parolis pri Esperanto, «kiu helpos por kooperacio inter la nacioj». Ankaŭ S-ro V. Moscheles parolis pri nia lingvo.

La Brita Dentista Asocio en lasta tempo decidis uzi Esperanton por sia internacia laboro; kaj nun plie la konata firmao de «Edwart Dental manufactory Co. Ltd.» (Dentfabrika kompanio), Londono, E. C. — 30 Finsbury Pavement uzas Esperanton por korespondado. Oni tion anoncis en la trimonata gazeto de tiu firmao. La kooperativa loĝejo por Virinaj laborantoj, (7, 9, Millman str. Great Ormond str. W. C.) aranĝas duan Esperantan rondon.

Avizo. — S-ro H. H. Elvin, Generala Sekretario de la «National Union of Clereks», 194-200, Bishopshate, Londono E. C., sciigas al ni, ke li estas organizanta vojaĝon tra Nederlando kaj Belgujo, kie okazos de la 10a ĝis la 26a de aŭgusto. La ekskursantoj vizitus Den Haag, Rotterdam, Amsterdam, Antwerpen, Brussel, Gent, Namur, Dinant, kaj Oostende. La organizanto dezirus interrilati kun esperantistoj loĝantaj en la suprecitita, urboj.

Oni raportas ke sesdek el la Londona urbopolicanaro lernas Esperanton, kaj oni esperas ke ili ricevos permeson porti la steleton. En junio okazis la ĉiujara Esperantisto festa, en la blankurbo ekspozicio Kvincent Esperantistoj ĉeestis el diversaj landoj kaj reprezente dekkvar naciojn. Oni faris bonan propagandan kunvenon por la neesperantistoj kaj la koncerto finis la tagon. Esperantista edziĝo okazis inter S-ro F. C. Corvell, kaj F-ino Daisy Grant, ambaŭ Nordstelanoj. Plie fianciĝis S-ro M. Creight Brown (New-Castle) kun F-ino M. Me Kollar Pitcairn (Rumanujo).

Svedujo. — La gazeto «*Esperantofolket*» reaperis en majo post unu jara halto kaŭzita de diversaj malfacilaĵoj. La monata gazeto «*Fyrvägplingen*» organo de la gejunula «*Exelsior*»-asocio en provinco Vestergötland komencis specialan fakon pri kaj por Esperanto. Por la somermeza kunveno de nomita asocio, parolado pri la internacia helplingvo estas enskribita sur la programo. Kunveno en Stockholm de Esperantistoj el la tuta lando estas preparata por la tagoj 14-15 de julio.

Svisujo. — La svisa gazeto «*Svisa Espero*» aperas nun alternante kun «*Monda Poŝto*» (eldonisto Thalman, Fischenthal, Zürich) 2 foje ĉiumonate, kaj estos en tiu formo pli bona propagandilo ol ĝis nun. Le Svisa Esperanto Societo kunvenis la 25an de Junio en Meggen apud Lucerno, beleta loko ĉe la lagbordo. La kunveno kaj festeto bone sukcesis. Samtempe okazis en la sama loko kunvenoj de svisa Esp. Kuracisto Asocio kaj distrikta kunveno de U. E. A. La Svisa samideanaro ĉiam kuraĝe kaj fervore propagandas kaj praktikas la Zamenhofan lingvon. J. W.

Urugvajo. — Plezure mi akceptas vian proponon, kiu honorigas min, pri la sendo de informoj pri nia esperanta movado, kiu, bedaŭrinde, estas tre malforta. La pasintan monaton oni malfermis en Montevideo senpagan kurson ĉe la «*Urugvaja Lernejo*» privata kaj grava lernejo, kies

ĉefprofesoro estas favora al nia afero. La kursoj okazas trifoje ĉiusemajne: ĉeestas multaj viroj kaj kelkaj virinoj. Paul V. Idoyaga.

Usono. — Oni sciigas nin el Boston, Massachusetts, ke nia fama samideano Dro Agostino Levanzin, el Malta insulo, kiu plenumis longan scienceksperimentan faston en la Carnegie Institute, faris en Boston la 18an de Junio gravan per kaj pro esperantan paroladon kiu havis multe da sukceso.

Asiria reĝo Asarhadono.

el originala rusa fabelo de L. Tolstoj
esperantigis F-ino Anna Ŝarapov (Moskvo-Rusujo)
ANTAŬPAROLO.

La ideo de la rakonto «*Asarhadono, reĝo asiria*» ne estas mia propra: mi ĝin prenis el rakonto de anonima aŭtoro, presita en la germana revuo «*Theosophischer Wegweiser*» (Teosofia vojontrilo, N° 5, 1903 kaj titolita «*Das bist du*» (ĝi estas ĉi.))

L. TOLSTOJ.

Asiria reĝo Asarhadono al militis la reĝon de la reĝo Zailio, detruis kaj brulis ĉiujn urbojn, ilian tutan loĝantaron transpelis sian landon, la militistojn mortigis, kaj Zailion mem, la reĝon enŝlosis en kaĝon.

Kuŝante nokte sur sia lito, reĝo Asarhadono pensis pri tio, kiel ekzekuti Zailion, kiam subite li ekaŭdis apud si susuron kaj, malferminte la okulojn, ekvidis maljunulon kun longa griza barbo kaj mildaj okuloj.

— Ci volas ekzekuti Zailion? demandis la maljunulo.

— Jes, — respondis la reĝo: Mi nur ne elpensis, per kia ekzekuto lin ekzekuti.

— Sed Zailio estas ja ci, diris la maljunulo.

— Ne vere, — diris la reĝo; mi estas mi, kaj Zailio — Zailio.

— Ci kaj Zailio estas la samo — diris la maljunulo. Al ci nur ŝajnas, ke ci ne estas Zailio, kaj Zailio — ne ci.

— Kion signifas «*ŝajnas*» diris la reĝo. Jen mi kuŝas sur mola litaĵo, min ĉirkaŭas sklavoj kaj sklavinoj, obeaj al mi; morgaŭ same, kiel hodiaŭ, mi festados kun miaj amikoj, — sed Zailio, kvazaŭ birdo, sidas en kaĝo kaj, morgaŭ li montiĝos, palisumita kun la elŝovita lango kaj konvulsiĝos, ĝis kiam li mortaĉos kaj lia korpo estos disŝirita de la hundoj.

Ci ne povas nenigi lian vivon, — diris la maljunulo.

La nomo mem de la reĝo estas historia. *Asur* — *ah* — *idaina* — (*La Dio Asur* donis fraton. Tiu nomo estas citita trifoje en la Biblio.

1) 2. *Reĝoj* XIX, 37 Asarhadono, la filo de Sinaheribo — Sin — ahi — ireb (*La Dio Sin* donis multe da fratoj) ekreĝis post li.

2) *Jesajo* XXXVII, 38 — Za sama sciigo, kiel en la antaŭa citato.

3) *Ezdra*, IV, 2 Asarhadono, reĝo asiria, venigis nin ĉi tien.

— Sed ĉu mi ne mortigis 14.000 militistojn kaj el iliaj korpoj kunmetis tie, altajon? diris la reĝo. — Mi vivas, sed ili malestas: sekve, mi povas nenigi la vivon.

— Kial ĝi ŝajnas al ci, ke ili malestas?

— Ĉar mi ve vidas ilin. La ĉefaĵo estas, ke ili turmentigis, — kaj mi ne, — al ili estis malbone, kaj al mi — bone.

— Ankaŭ tio nur ŝajnas al ci. Ci turmentis cin mem kaj ne ilin.

— Mi ne komprenas, diris la reĝo.

— Ci volas kompreni?

— Mi volas.

— Venu ĉi-tien, — diris la maljunulo, montrinte al la reĝo banujon plenan da akvo.

La reĝo leviĝis kaj alpaŝis la banujon.

— Servestigu cin kaj eniru banujon.

Asarhadono faris tion, kion al li ordonis la maljunulo.

— Nun, tuj kiam mi verŝos sur cin tiun ĉi akvon, — diris la maljunulo, ĉerpinte iom da akvo, en kruĉon; subakvigu cin tutkorpe.

La maljunulo klinis la kruĉon super la kapo de la reĝo, kaj la reĝo subakviĝis. Tuj kiam la reĝo Asarhadono subakviĝis, li eksentis sin mem ne Asarhadono, sed alia homo. Kaj jen sentante sin jam tiu alia homo, li vidas sin kuŝanta sur riĉa lito apud bela virino. Li neniam vidis tiun virinon, sed li scias ke ĝi estas lia edzino. Tiu virino leviĝetas kaj diras al li: « Kara mia edzo Zailio, ci laciĝis de la hieraŭaj laboroj kaj tial dormis pli longe, ol kutime, sed mi gardis cian ripozadon kaj jen vekis cin. Nun la princoj atendas cin en la granda ĉambrego. Vestu cin kaj iru akcepti ilin.

Asarhadono, komprenante per tiuj vortoj ke li estas Zailio, kaj ne nur ne mirante pri tio, sed mirante, ke li ĝis nun ne sciis tion, leviĝas, sin vestas kaj iras al la granda ĉambrego, kie la princoj atendas lin.

La princoj per ĝistera saluto renkontas sian reĝon Zailion, poste ili leviĝas kaj laŭ lia ordono sidiĝas antaŭ li. La plej aĝa el la princoj ekparolas pri tio, ke oni ne povas pli longe toleri ĉiujn ofendojn de malbona reĝo — Asarhadono, kaj oni devas militiri kontraŭ li.

Sed Zailio ne konsentas kun ili kaj ordonas sendi ambasadorojn al Asarhadono, por lin admoni, kaj li foririgas la princojn. Post tio li elektas ambasadorojn el respektindaj homoj kaj instruas ilin detale pri tio, kion ili devas diri al la reĝo Asarhadono. Fininte tiujn aferojn, Asarhadono, sentante sin Zailio, elrajdas sur la montojn por ĉasi sovaĝajn azenojn. La ĉaso estas sukcesa. Li mem mortigas du azenojn, kaj, reveninte hejme, festadas kun siaj amikoj, rigardante la dancadon de la sklavinoj.

Alian tagon, laŭkutime, li eliras en la korton, kie lin atendas petantoj, juĝotoj, procesantoj, kaj decidas pri la aferoj, prezentatoj

al li. Fininte tiujn aferojn li ree veturas al sia amata amuzo — ĉaso. Kaj tiun tagon li mem sukcesas mortigi maljunan leoninon kaj kapti ŝiajn du leonidojn. Post la ĉaso li denove festenas kun siaj amikoj sia amuzante per muziko kaj dancado; la nokton li pasigas kun sia amata edzino.

Tiel vivas li tagojn kaj semajnojn, atendante la revenon de la ambasadoroj, senditaj al tiu reĝo Asarhadono, kiu li estis antaŭe. La senditoj revenas nur post monato kaj revenas kun la fortrancitaj nazoj kaj oreloj.

La reĝo Asarhadono ordonas diri al Zailio ke la farito al liaj senditoj, estos farita ankaŭ al li, se li tuj post la reveno ne sendos la fiksitajn tributojn da arĝento, oro kaj cipresa ligno kaj ne alveturos li mem, por esprimi sian obeemon.

Zailio, antaŭa Asarhadono, denove kunvenigas la princojn kaj konsiliĝas kun ili pri tio, kion oni devas fari. Ĉiuj unuvoĉe diras, ke oni devas, ne atendante la atakon de Asarhadono, militiri kontraŭ li. La reĝo konsentas, kaj mem, komandante la militistaron, ekmilitiras. La militiro daŭras tagojn. Ĉiutage la reĝo ĉirkaŭrajdas sian militistaron kaj ekscitas la kuragon de siaj militistoj. La 8an tagon lia militistaro renkontiĝas kontraŭ la militistaro de Asarhadono en larĝa valo, borde de rivero. La militistaro de Zailio brave batalas, sed Zailio, antaŭe Asarhadono, vidas, ke la malamikoj kvazaŭ formikoj konkuras de la montoj, subakvigas la valojn kaj venkas la militistaron. Tial li sur sia ĉaro, sin jetas meze de la batalo, pikas kaj atakas la malamikojn.

Sed Zailio havas centojn da militistoj kaj Asarhadono — milojn. Plie, Zailio sentas ke li estas vundita kaj oni lin kaptas.

Nau tagojn li kun aliaj kaptitoj marŝas ligita inter la militistoj de Asarhadono. La dekan tagon oni lin venigas Ninivion kaj metas en kaĝon.

Zailio suferas ne tiom pro la malsato kaj vundoj, kiom pro la honto kaj senforta kolero. Li sentas sin senforta revengi la malamikon pro la tuta malbono, kiun li suferas. Solan aferon li povas — ĝi estas senigi siajn malamikojn je la ĝojo vidi liajn suferojn, kaj li firme decidis kuraĝe, senmurmure, toleri ĉion, kio okazos al li.

20 tagojn sidas li en la kaĝo, atendante la ekzekuton. Li vidas, kiel oni kondukas al la ekzekuto liajn parencojn kaj amikojn, aŭdas la ĝemojn de la ekzekutataj: al unuj el ili oni forhakas manojn kaj piedojn, al aliaj — vivantaj oni forŝiras la haŭton, sed li elmontras nek maltranvilon, nek kompaton, nek timon. Li vidas, kiel la ĉenukoj kondukas ligita lian amaton edzinon, li scias, ke ili kondukas ŝin por ke ŝi estu sklavino de Asarhadono. Kaj tion li ankaŭ toleras senplende.

Sed jen du ekzekutistoj malslosas la kaĝon kaj, forte kuntirinte liajn brakojn post la dorso per rimeno, ili kondukas lin al la ekzekutejo, superverŝita de sango. Li vidas la pintan sangkovritan palison, de kiu oni ĵus forŝiris la korpon de lia amiko, mor-

tinta sur ĝi, kaj li komprenas, ke tiun palison oni liberigis, por ekzekuti lin mem.

De li oni formetas la ves:on. Zailio terurigas pri la malgraseco de sia iam fortika bela korpo. Du ekzekutistoj kaptas tiun korpon ĉe malgrasaj femuroj, levas kaj volas faligi, por palisumi. — Tuj — la morto, la nenigo, — pensas Zailio, kaj forgesante sian decidon gardi kuraĝe la trankvilon ĝis la fino, li, ploregante, petegas pri la indulgo. Sed neniu aŭdas lin.

— « Sed tio ne povas esti, » li pensas, — mi kredeble, dormas. Ĝi estas songo. Kaj li penas vekigi. — Mi ne estas ja Zailio, sed Asarhadono, pensas li.

— Ci estas kaj Zailio, kaj Asarhadono, — aŭdas li iam voĉon kaj sentas, ke la ekzekuto komenciĝas. Li ekkrias, kaj sammomente eltiras la kapon el la banujo. La maljunulo staras antaŭ li verŝante sur lian kapon la restaĵojn de la akvo en la kruĉo.

— Ho, kiel terure mi turmentiĝis. Kaj kiel longe! diras Asarhadono.

— Ĉu longe? — diras la maljunulo. — Ci ĵus subakvigis la kapon kaj tuj denove ĝin eltiris; ci vidas, la akvo el la kruĉo ankoraŭ ne tuta elversĝis. Ĉu ci nun komprenis?

— Asarhadono nenion respondis kaj nur kun teruro rigardas al la maljunulo.

— Ĉu ci nun komprenis, daŭrigas la maljunulo, ke Zailio estas ci kaj ke la militistoj, kiujn ci igis mortigi estas ankaŭ ci kaj ne nur la militistoj, sed tiuj bestoj, kiujn ci ĉasmortigis kaj manĝegis dum tiaj festenoj estis ankaŭ ci. Ci pensis, ke la vivo estas nur en ci, sed mi fortiris de ci vualon de iluzio kaj ci vidis, ke, farante malbonon al aliaj, ci faris ĝin al ci.

La vivo estas la uno en ĉio, kaj ci elmontras en ci nur parton de tiu unu vivo. Sole en tiu ĉia parto de la vivo, en ci mem, ci povas plibonigi aŭ malplibonigi, pliigi aŭ malpliigi la vivon. Plibonigi la vivon en ci mem ci povos nur per tio, ke ci detruos la limojn, apartigantajn cian vivon de aliaj estaĵoj, konsideros aliajn estaĵojn, kiel cin mem, amos ilin; neniigi la vivon en aliaj estaĵoj ne estas en ĉia povo. La vivo de la estaĵoj, mortigitaj de ci, malaperis el ĉiaj okuloj, sed ne neniigis. Ci pensis plilongigi cian vivon kaj plimallongigi la vivon de aliaj, sed ci ne povas fari tion. Por la vivo ekzistas nek tempo, nek loko. La vivo estas momento kaj la vivo estas miloj da jaroj; vivo ĉia kaj la vivo de ĉiuj videblaj kaj nevideblaj estaĵoj de la mondo estas egalaj. La vivon neniigi aŭ ŝanĝi oni ne povas. ĉar ĝi estas nur sola. Ĉio cetera al ni nur ŝajnas.

Dirinte tion, la maljunulo malaperis.

La sekvantan matenon la reĝo Asarhadono ordonis liberigi Zailion kaj ĉiujn kaptitojn; li ĉesigis la ekzekutojn.

La trian tagon li vokis sian filon *Asurbanipalon* (1) kaj transdonis al li la regnon. Li mem foriĝis unue en la dezerton, por pripensi tion, kion li eksciis. Kaj poste li marŝadis, kiel migranto, tra la urboj kaj vilaĝoj predikante, ke la vivo estas unu, kaj ke la homoj faras la malbonon nur al si mem, kiam ili volas fari malbonon al aliaj estaĵoj.

BIBLIOGRAFIO

La Biblio — III-a libro — **Levidoj**; el la originalo tradukis D-ro L. L. Zamenhof. — Paris. Librairie Hachette & Co. — Prezo 2.00.

Aperis la tria libro de la biblia traduko verkita de nia kara Majstro. Krom la intereso kiun prezentas la legado de unu el la plej antikvaj libroj de la tero, la fakto ke tiu verko estas tradukita el la originala lingvo kaj ke la esperanta teksto estas verkita de nia Majstro mem devas inciti la esperantaj legantojn akiri tiun bone eldonitan volumon. La nuna libro estas despli interesa ĉar ĝia enlavo rilatas leĝojn kaj kutimojn de Mosco, kiuj regis la Israelan popolon de la plej malnovaj tempaj ĝis nun.

O. V. S.

August Senoa: La trezoro de l'orajisto. (Kroate: Zlatarovo zlato). El Kroata lingva tradukis Frau Kolar (Krom). Zagreb. Propra eldon. Prezo 1 Sm. p. 290.

Do, ankaŭ en mia patrujo aperis la unua esperanta libro! Kaj tuj: tuta romano, granda, dika, 290 paĝa volumo!

La energio, — kaj precipe la volo de la tradukinto estas vere laŭdinda, sed — bedaŭrinde kun la aldono de tia dua duono de l'konato frazo: — mankis la forto!

Kion? mi aŭdas jam la demandon, — ĉu vi havas tiom da kuraĝo, ke vi ankaŭ kontraŭ nia estiminda eminentulo: Dro Bein (Kabe) direktas viaŭ plumon?; — Ĉu ne estas tuj sur unu el la unuaj paĝoj presita: «... Kaj antaŭdiras plenan sukceson; juĝante laŭ la stilo de via letero mi ne dubas, ke la trezoro de l'orajisto estos vera. — ornamo de nia literaturo. R. Bein, (Kabe)».

Jes, tio estas vera. — S-ro tradukinto mi devas plejakra malaprobi, — eĉ tiam, se la antaŭdiro de nia tre estimata eminentulo estus efektiviginta.

Kontraŭ tia reklamo devas protesti precipe mi, kiel samnaciono de l' tradukinto, ke la eksterlandaj esperantistoj kaj nia honorinda S-ro Bein ne prijuĝu nin laŭ la neojala agadmaniero de l' S-ro tradukinto.

Nun, al la tradukajo mem!

S-ro tradukinto unue tute ne atentis la regularon por tradukontoj pri la elekto de tradukota verko. Mi tute konsentas kun la tradukinto, ke «La trezoro de l'orajisto» estas vera perlo de l'Kroata literaturo, sed pro tio, ĉar ĝi estas eminenta nacia verko laŭ stila kaj tema vidpunkto, ĝi ne estis oportuna por traduko en Esperanton kaj pro tio ankaŭ estis multaj frazoj tre malfacilaj por traduko.

Mi direktas al la tradukinto nur ĉi tiun demandon: kiun eksterlandanon, — kiu ne vidis nian Zagreb, ĉe furbon de Kroatujo en nuna stato — povas interesi tre ampleksaj priskriboj de l'sama urbo kaj ĝia ĉirkaŭajo dum la XVI-a jarcento?

(1) *Asur-bani-habut* (La Dio) Asuro kreis la filon. Tiu reĝo estas citita en la Biblio sub la nomo *Asnapaver* (Esdro IV, 10)

Due, s^o tradukinto tre ofte tradukis ne la sencon, la ideojn de l' verko, sed ĝiajn vortojn, eĉ literojn. Pro tio okazis ke multaj frazoj estas tute ne kompreneblaj por tiuj, kiu ne konas la originalon.

Oni tiom kaj tiom akceptas, ke la tradukaĵo devas esti fotograĵo de l' originalo. Estas kompreneble, ke tiu fotograĵo estas la plej brua kaj fidela, kiom oni povas la saman ideon traduki per la samaj vortoj, sed se tio ne estos ebla, forjetu la samajn vortojn, kaj esprimu nur la saman ideon, ĉar ĝi estas la ĉefaĵo, la celo, la vortoj estas ja nur rimedoj.

Kelkfoje S^o tradukinto faris la kontraŭon: li ne volis esprimi la saman ideon per la samaj vortoj, kvankam li tiamaniere povis plej fidele fotografe la saman ideon. Mi aludas precipe la surskribon de l' verko. Kial do se tradukinto ne tradukis: « Zlatarovo zlato » laŭvorte: La oro de l' orajisto ». Ĉu li ne vidas ke la verkisto mem volis arbitre uzi la samajn radikojn: Zlatarovo Zlato? Kaj en Esperanto signifus tiaj vortoj la saman ideon kiel en la Kroata originalo.

Kontraŭe, s^o tradukinto kelkfoje tiel obstine sekvis la fidelecon de tradukado, ke li fotografis eĉ signojn! En la originalo troviĝas: « Pomoz, Bog! (l. e. pomozt Bog) kio laŭvorte signifas: Helpu Dio! sed, s^o tradukinto opiniis, ke li devis konservi ankaŭ la apostrofon kaj tradukis: Help' Dio! — kaj tio signifas en Esperanto — nenion.

Mi citas kelkajn ekzemplojn por montri, ke s^o Kolar tradukis nur la vortojn, kaj ne la sencon kaj ideo: ne estas bone: ili sin laŭdis: Kroate pohvalise se, sed ili fanfaronis; ili sin haltis, sed: ili haltis. La frazo: « li alepziĝis la metion » estas malbona laŭ gramatika kaj logika vidpunkto. Unue, la kun-sufikso *ĝi* kunmetitaj verboj, ne estas transitivoj kaj ili ne povas havi objekton, kaj due la frazo estas tute ne komprenebla. La senco estas ĉi tio: li edziĝinte ricevis la metion, aŭ: li dote ricevis la metion. Ne estas bone tradukita laŭvorte: ducent ĉenojn da tero, sed: ducent akreojn da grundo; ne: terura avertaĵo al ĉiuj perfiduloj, sed: terura aver, tilo...; ne: ĉe la mueliloj... sed: ĉe la muelejoj; ne: postlarmaj okuloj, sed: larmoplenaj okuloj, ne: La popolo sin dislariĝigas. Maldensejo aperis sur la placo, sed: La popolo disigis. La placmezo restis senhoma. Maldensejo estas senarba loko en la mezo de arbaro. (Kabe: Vortaro de Esperanto). — Kiaj estas « pafiloj kun lipharoj »? Ne estas bone: krudŝtono de ilia rajto sed: fundamenta ŝtono...

Tute malbone estas tradukita la kroata vorto. Zupan (t): Komitatestro' anstataŭ: departementestro aŭ: guberniestro. S-ro tradukinto konfuzis esperantan vorton: komitato kaj latin-germanan vorton: das Comitatus (Kroate: jupanija) kaj al tiu lasta vorto aldonis esperantan sufikson: — estro, kaj — kompreneble — obtenis tute alian esperantan vorton.

Vera sensencaĵo estas: « la novsektanoj en roma imperio *folie* vekigis ». En nacia idiomo serbo-kroata tio signifas: are aŭ amase.

Ne estas bone: mallaŭmonten, ĉar mallaŭ signifas ĉi tie nenion. Oni diras: montsupren kaj montmalsupren.

Mi povus ankoraŭ multajn malbonaĵojn citi, sed mi opinias ke la supraj ankaŭ sufiĉas. Mi devas ankoraŭ konstati, ke S-ro tradukinto faris ankaŭ multajn gramatikajn erarojn, kiuj montras la mankon de rudimenta kono gramatika.

Sed, fine mi devas konfesi ankaŭ tion, S-ro tradukinto sukcesis kelkajn partojn tre bele, eĉ modele traduki. Kaj tio igas min konkludi, ke S-ro tradukinto faris sian laboron kun nesufiĉa atentemo.

Do, la alian fojon kun pli multa atentemo, kaj — modesteco! Anstataŭ la leteron de Kabe, — antaŭmetu S-ro tradukinto (antaŭ sin) lian bonegan — vortaron!

P.O.

(1) elp: jupan.



Okaze de la centa datreveno de la naskiĝo de

HENDRIK CONSCIENCE,

la fama Flandra romanverkisto,

JUS APERIS:

RIKKE-TIKKE-TAK

ĉarma kampara rakonto, esperantigita de

MARIA POSENAER,

I. U. E. V.

La libro enhavas biografion kaj belan portreton de CONSCIENCE. Ĝi havas artplenan eksterajon, kaj estas presita sur luksa papero.

Rikke=Tikke=Tak

estas la unua verko rekomendita de la Internacia Unuiĝo de Esperantaj Verkistoj.

Formato: 13 1/2 × 20 — 112 paĝoj

Prezo: Fr. 2.00 (Sm. 0.800)

Havebla ĉe la tradukintino:

KROONSTRAAT, 45 — BORGERHOUT-ANTWERPEN

—: BELGUJO :—

"CONSTANTIA,"

ASEKUROJ PRI LA VIVO

— KAJ PRI FORMADO DE KAPITALOJ

Anonimaj Societoj sub la Ŝtatkontrolo en Francujo.

SIDEJO :

Maria-Theresialei, 1 & 3, ANTWERPEN

SPECIALA SIDEJO :

Place Sébastopol, 27, LILLE (Francujo)

Asekuroj pri la vivo kaj ŝpartitoloj kun garantiita
trimonataj repagoj, je semajno — kaj monatpagoj.

AGENTOJ RICEVAS TRE FAVORAJN KONDIĈOJN

Banque de Flandre

ANONIMA SOCIETO en GENT FONDITA EN 1847

Deponaĵaj kaj Duonmonataj Kontoj

Diskonto kaj enkasigo de biloj

Kreditleteroj

Konservado de obligacioj kaj titoloj

Pruntedono sur obligacioj

Aĉeto kaj Vendo de obligacioj

Enkasigo de Kuponoj

Luigo de monkestoj

Ĉiuj bankaferoj

Belga Ligo Esperantista

ĈIUJARA KOTIZAĴO

(JAARLIJKSCHE BIJDRAGE — COTISATION ANNUELLE) :

Ordinaraĵaj membroj (Gewone leden. — Membres ordinaires). Fr. 1.00
Protektantaĵaj membroj (Beschermdede leden. — Membres protecteurs). » 10.00
Bonfarantaĵaj membroj (Leden-weldoeners. — Membres bienfaiteurs). » 25.00

Honora Komitato :

S-roj F. COCO, skabeno de la Publika Instruado, Ixelles.
D-ro V. DESGUIN, skabeno de la Publika Instruado, Antwerpen.
CH. DESSAIN, urbestro de Mechelen.
DEVREUX, urbestro, Charleroi.
DEWANDRE, skabeno de la Publika Instruado, Charleroi.
DUBOIS, direktoro de la Supera Komerca Lernejo, Antwerpen.
D-ro GASTER, direktoro de la Germana Lernejo, Antwerpen.
Senatano HOUZEAU DE LAHAIE, Mons.
Frato IZIDORO, profesoro de la Reĝa Instituto de Surtmutuloj kaj de Blinduloj, Woluwe-Bruselo.
Senatano LAFONTAINE, Bruselo.
O. ORBAN, profesoro de la Universitato, Liège.
PASTUR, konstanta deputato de la provinco, Marcinelle.
Barono RUZETTE-VAN CALOEN DE BASSEGHEM, provincestro de Okcidenta Flandro, Brugge.
J. SCHRAMME, advokato, skabeno de la Publika Instruado, Brugge.
J. SPINHAYER, sbakeno, Verviers.
D-ro R. VAN MEJCKEBEKE, nemiisto, Antwerpen.

AGADA KOMITATO

Prezidanto : S-ro A. J. Witteryck, 4, Nieuwe Wandeling, Brugge.
Vicprezidanto : S-ro Pastro Richardson kaj S-ro L. Delvaux.
Generala Sekretario : S-ro L. Champy, 19, Lange Herenthalsstraat, Antwerpen.
Kasisto : S-ro F. Mathieux, 49, Marché-aux-Poulets, Bruxelles.

MEMBROJ ELEKTITAJ DE LA ĜENERALA KUNVENO

S-roj K. Babilon (Boom), L. Champy (Antwerpen), D-ro Dupont (Beyne-Heusay), Jos. Parotte (Verviers), Pastro Richardson (Bruxelles), kaj Osc. Van Schoor (Antwerpen).

DELEGITOJ DE LA GRUPOJ

ANTWERPEN (*Antverpena Grupo Esperantista*), S-roj Ad. Finet, D-ro W. Van der Biest.
» (*La Verda Stelo*), S-roj J. Hermans, Frans Schoofs.
» (*La Suda Lumo*), S-ro F. Van Ganssen.
» (*Esperanta Unuiĝo*), S-ro B. de Vries.
» (*Verda Standardo*), S-ro A. Vermandel.
BERCHEM (*Berchema Grupo Esperantista*), S-ro A. De la Haye.
BEYNE-HEUSAY (*Antaŭen*), S-roj Jules Albert, Jean Scuvée.
BOOM (*Booma Grupo Esperantista*), S-ro Jules Clerbaut.
BORGERHOUT (*Laboro*), F-ino Maria Posenaeer.
BRUGGE (*Bruga Grupo Esperantista*), F-ino B. Ledène, S-ro A. J. Witteryck.
BRUXELLES (*Brusela Federacio Esperantista*), S-ro F. Mathieux.
» (*La Zamenhof*), S-ro Victor Lamberts.
CHARLEROI (*Karlereĝa Grupo Esperantista*), S-ro L. Delvaux.
GENT (*Genta Grupo Esperantista*), S-ro Sebruyens-Vromant.
HUY (*Esperantista Grupo*), S-ro H. Thiry.
LIÈGE (*Esperantista grupo*) S-ro Simon Vatriquant.
MORESNET-BELGE (*La Fidelaj Amikoj de Zamenhof*), S-ro P. J. Schmetz.
NAMUR (*Namura Stelo*), S-ro A. Verbeken.
ST-GILLES-BRUSELO (*Antaŭen*), S-ro Emilio Baez.
SINTE-MARIABURG (*Verda Flago*), S-ro J. Van de Stadt.
SPA- (*Société Esperanto de Spa*), S-ino Biske kaj F-ino Stronck.
VERVIERS (*La Verda Stelo*), S-ro Joseph Pirnay.
» (*Esperantista Grupo*) S-ino Parotte.

Centra Esperantista Belga Oficejo

20, Vondelstraat, 20 ANTWERPEN (ANVERS).



Abonoj al ĉiuj
esperantistoj gazet-
oj kaj revuoj.

Esperantaj ĉekoj
kaj transpagiloj.

Mendo de ĉiuj-
specaj esperantistaj
eldonaĵoj, libroj,
muziko, k. t. p. el
ĉiuj landoj.

Libroj kaj ĉiuspecaj eldonaĵoj.

- Fr. Swagers.** — *La gaja kantaro*, 12 kantoj laŭ regionaj popolaj konataj melodioj. fr. 0,25 (10 Sd.)
- C. E. B. O.** — *Belga Adresaro Esperantista*. fr. 0,50 (20 Sd.)
afrankite por Belgujo fr. 0,60. — Eksterlanden fr. 0,75 (30 Sd.)
- A. J. Witteryck.** — *Het Esperanto in tien lessen*, naar Cart en Pagnier. fr. 0,60 (24 Sd.)
- Sino Van Melckebeke-Van Hove.** — *Blinda Rozo*, de Hendrik Conscience, kun 4 bildoj. fr. 1,00 (40 Sd.)
- O. Van Schoor.** — *La turisto kun la verda stelo*. Originala monologo por Sinjoro. fr. 0,50 (20 Sd.)
- Formortinta Delsuno (Zaliger Van Zon)* de R. Vermandere. esperantigita de O. Van Schoor. Kun surlignaj gravuraĵoj de H. Van Offel. fr. 2,50 (1 Sm.)
- Judas'o*. Drama monologo por Sinjoro. originale verkita de O. Van Schoor. fr. 0,50 (20 Sd.)
- D-ro W. Van der Biest** *Amours espérantistes*, Vaudeville, en un acte. fr. 0,50 (20 Sd.)
- Ŝi ne legos sin*, Monologo por fraŭlino. fr. 0,50 (20 Sd.)
- Em. Van Driessche.** *Por kvietaj personoj*. Unuakta komedieto esperantigita de Amatus. fr. 0,50 (20 Sd.)
- Nestor de Tière** *Dovo de reĝo*. Unuakta tezo por du personoj (viro kaj virino) esperantigis Amatus. fr. 0,50 (20 Sd.)
- Johanna Van Woude** *Ne dezirita — Ni virinoj*. Du skizoj, esperantigis Maria Posenauer. fr. 0,60 (24 Sd.)
- Esperantaj ŝlosiloj Ĉefĉekoj*. — Eldono franca, angla, germana, holanda, hispana, kataluna, sveda, rusa, dana, hungara, rumana, portugala, bohema. 1 ekzempl. 0,10. — 10 ekz. 0,60 rabaton po kvanto
- Tout l'Esperanto*. fr. 0,10 (4 Sd.)
- Das ganze Esperanto*. fr. 0,10 (4 Sd.)
- Esperantista kantareto*, ses belaj kantoj kun la notitaj melodioj fr. 0,50 (20 Sd.)
II kvin fr. 0,40 (16 Sd.)
- Belegaj ilustritaj poŝtkartoj* de la Antverpena kongreso. La tuta serio, de 25 poŝtkartoj. fr. 2,00
- Propagandaj Poŝtkartoj* kun la kanto Espero (Muziko de Mènil) 100 ekzempl. 2,00 — 500 ekz. 7,50 — 1000 ekz. 12,00.
- Ilustritaj poŝtkartoj* kun bela portreto de D-ro Zamenhof. 1 ekz. fr. 0,10. — 12 ekz. fr. 1,00. — 25 ekz. fr. 1,75.
- Portreto* de Amatus Van der Biest. Belegaj ekzempleroj granda formato. sur bela kartono presitaj fr. 0,25 (1 Sd.)

ESPERANTISTAJ INSIGNOJ

- Grandaj steloj kun surskribo «Esperanto» broŝo aŭ pinglo.
Verdaj steloj sur flanka rondo, broŝo aŭ pinglo.
Malgrandaj verdaj steloj, broŝo aŭ pinglo.
Verda stelo, granda modelo kun cifero 7 (rememoraĵo de la 7a Kongreso).
1 ekzempl. fr. 1. — 10 ekzempl. 7,50.

Feraĵvendejo

Charles PLATTEAU

Telefono 2220

14, Vleminckveld, Antwerpen

(Apud la KLEIN MARKT)

Speciala vendejo de konstruajnecesajoj, iloj, testudfajrejoj, ĉiuspecaj kaloriferoj. Emajlitaj kuirejaj fajrejoj laŭ la lasta sistemo. Ĝardenmebloj. — Mastrumaj iloj. — Anglaj litoj. 34

KAFOJ

Jos. COLLIN

La plej bonaj!
La plej malmultekostaj!
Provu!
Vi ne plu deziras aliajn!

Granda Centra Drog- kaj Spic-Vendejo

30 Brabantdam 30
Digue de Brabant

GENT-GAND

TELEFONO 892

Oni portas hejmen
Dum la somero oni portas la
menditaĵojn en la kamparon.

GERMANA ESPERANTISTO

Duonmonate gazeta por la disvastigo
de la lingvo Esperanto
La gazeto aperas en du eldonoj, kiuj
duonmonate alternas.

Eldono A, eliranta la 5 an de ĉiu
monato, celas la propagandon por
Esperanto

Eldono B, eliranta la 20 an de ĉiu
monato, estas pure literatura.

Jara abonprezo por ĉiuj, landoj 2,250 S.
La abonoj nur komenciĝas en Janu-
aro, Aprilo, Julio kaj Oktobro.

Laŭdezire oni povas aparte aboni ĉiujn
el ambaŭ tute sendependaj eldonoj por la
duono de la supre montritaj prezoj.

Esperanto Verlag Möller & Borel 5
BERLIN SW. 68. Lindenstr. 18-19

Oni Rikoltas kion oni Semas!

Gesamideoj,

Se dum la somero, vi deziras en
via ĝardeno belajn florojn, kaj sur
viaj tabloj bongustajn legomojn, acetu
ĉiam viajn semojn en la bonkonata
firmo:

J. VAN DE VELDE-VAN LUNEN

Negocisto en Semoj

— (FONDATA EN 1865) —

« IN DE RAAP »

Geitestraat, 28, MECHELEN

Oni korespondas Esperante 1

HÔTEL DU MOULIN D'OR

30, rue d'Assaut, BRUXELLES

Bona kaj komforta hotelo kaj restoracio. Tre moderaj prezoj.
Ĉiutaga pensio, de 6 fr. — Ĉambro, matenmanĝo, de 3 fr.
Kunvenejo de la komitato de la *Belga Ligo Esperantista*.

Gastotablo kaj posttagmeza « teo » por samideanoj.

Oni korespondas Esperante kaj parolas

France, Nederlande, Germane kaj Angle.

Novaj Libroj kaj Ĵurnaloj

G. Davidov. — Titolaro de esperantaj verkoj tradukitaj el la Rusa Literatura, kun antaŭparolo de B. Kotein. Librejo Esperanto. Tverskaja 26, Moskvo. Prezo 10 kopekoj.

Sino M. Sidlovskaĵa. — Princo Serebrĵnij, historia romano de Grafo A. Tolstoj. — Librejo Esperanto Tverskaja 26, Moskvo. (Literatura aldono de gazeto « Ondo de Esperanto »)

Panonio. — 1a jaro, 1a n^o, Julio 1912. Jarabono 2 kronoj. — Győr, Vasárter 9 Hungarujo.

CZESLAW KOZŁOWSKI. — **Petaloj.** — Aro da versaĵoj originale verkitaj en Esperanto. Ĉe l'aŭtoro, Kiew, Malo-Vladimirska, 26.

NORD-GERMANAJ RAKONTOJ de Heinrich Bandlow, tradukis Ella Scheerpeltz. N^o 22 de Esperanta Biblioteko Internacia, Berlin Motler & Borel. Prezo 0.25 fr.

Sergio Martos. — **Deziro de la Diakono.** Novelo el Ukrainaj lingvo: esperantigis Anatolo Koh. Universa Esperanta Librejo, Gènéve. Prezo 15 Sd.

La Internacia Organizo de la Esperanto Movado. — Kritikaj artikoloj Dro Smulder. Mendebla ĉe So Sleijffers, Prins Hendrikstraet, 93, Den Haag, Nederlando.

Krakow. Urbo de Jubilea Kongreso 1912. Ilustrita gridlibro tra Krakow kaj ĉirkaŭaĵo. Mendebla ĉe la kongresa organizado en Krakow.

DIVERSAJ INFORMOJ

Firmo serĉanta bonan reprezentadon en Bulgarujo sendu proponon kaj kondiĉojn al Atanas P. Koleff, 46, Regentska, Sofio. Bonaj referencoj. Ori korespondas esperante.

—:—:—
Desiras korespondi: S-ro M. V. Smirnov, shesternia Citroen, Zavod Jurievskaja, Lefortovo, Moskvo, Rusujo.

Koresponda Fako

Misteraĵoj. — Ni ricevis la artikoleon titolitan «Misteraĵoj» kaj ni bedaŭras ke ni ne povas enpresigi ĝin. Bonvolu protesti ĉe la Ligo.
RED.

Gratuloj

Ni prezentas niajn korajn gratulojn al Fraŭlino MARIA DOMEZ el Verviers kaj al S-ro JOS. PIRNAY, vic-prezidanto de la Esperantista Grupo kaj prezidanto de la Verda Stelo, en Verviers, kiuj antaŭ kelkaj tagoj gefianĉigis.

La kediva registaro de Egiptujo dezirante honorigi nian samideanon belgan, la simpatian Fraton Isidore Clé, pro la gravaj raportoj kiujn li prezentis ĉe la kongreso de Kairo, nomis lin Oficiro de la Ordeno de Medjidié.

Niajn korajn gratulojn!

Plej bonaj trikotajoj

strumpoj, ŝtrumpet
veŝtoj, kalsonoj, kamizol
oj, ĉemizoj, kaj infanaj
vestaĵoj estas aĉeteblaj ĉe

la firmo

MATHIEUX

49 Marché aux Poulets

BRUSELO

Speciala vendejo de

KAFO, CIKORIO, TEO
kaj ĈOKOLADAĴOJ
SPICAJ,
KONSERVAĴOJ,
SEKITAĴAJ FRUKTOJ

M. J. CASSIERS

30, LANGE CLARENSTRAAT

LONG. R. DES CLAIRES, 30

ANTWERPEN

—:— ANVERS —:— 50


JOS. VAN DEN BOSCH

52 LANGE NIEUWSTRAAT 52
LONGUE RUE NEUVE
ANTWERPEN

Aĉetas, vendas kaj interŝanĝas
poŝmarkojn por kolektoj.

— ALBUMOJ KAJ NECESAĴOJ —
— POR FILATELIISTOJ —

Sendas por elekto, kun granda
rabato sur katalogoj kaj laŭ
mankolisto. 49



LAVMAŜINO
MORISONS

Lavas la puntojn ne dissirante
unu fadenon

La masino ne havas:
lignajn pintojn
stangon meze de la kovo
kugletojn
risortojn
radetojn.

La ŝapako estas puŝata tra la
lavota tolaĵo de dekstre maldek-
stren, de maldekstre dekstren, de
la centro al la randoj, de malsupre
supren. La ilo batas la tolaĵon
samtempe sur ĝian tutan supraĵon.

Ĝi lavas la nobiligitan tolaĵon en 6 minutoj, kaj funkcias per sia propra pezo.

—:— Sidante oni lavas —:—

Mi prove sendas por unu monato lavmaŝinon « MORISONS » al ĉiu
persono en Belgujo kiun mi juĝas fidinda kaj mi mem pagas la send- kaj
resendelspezojn.

La lavmaŝino Morisons estas aĉetebla kontraŭ ĉiusemajnaj aŭ ĉiu-
monataj partpagoj.

Mendu la ilustritan broŝuron n^o 272 kun prezoj ĉe 45

J. L. MORISONS, 109, Dambruggestraat, Antwerpen

Belga Esperantisto gratulas la novajn gefianĉojn, *F-ino Marie Meurée*, el Charleroi kaj S-ro *Willy Ernst*, komitatano de la karlorega Grupo.

HUMORAĴOJ

A. — Ĉu vi ankoraŭ ĉiam serĉas vian hundon?

B. — Jes.

A. — Kial vi ne metas informon en la gazeton?

B. — La malfeliĉa besto ja ne povas legi.

F-ino M. KLINGELHOETS.

LI SIMILIS AL SIA PATRINO.

Mario (al sia senbarba frato). — Sed, Karlo, kial vi ne havas barbon kiel la aliaj junuloj?

Karlo. — Ĉu vi ne ĉiam aŭdis diri, ke mi pli similas al patrino ol al patro?

Mario. — Jes, Karlo.

Karlo. — Nu, ĉu patrino havas barbon?

J. J.

SONORIGU!

— Johano, kiam mi dormas, tiam vi devas forpreni la lampon.

— Jes, sinjoro, kiam vi dormas, sonorigu kaj mi tuj venos.

J. J.

NE TURNU LA KAPON.

Serĝento. — Kial vi turnas ĉiam la kapon, soldato?

Soldato. — Mi faligis ion, serĝento.

Serĝento. — Eĉ se falus la kapo de via korpo, vi ankoraŭ ne bezonas turni ĝin, ĉu vi komprenas?

J. J.

Z. ADAM (Zakrzewski)

Historio de Esperanto

VERKO PREMIITA EN KONKURSO DE « LA SEPO » 1911

(Daŭrigo)

Post tiu solena parolado, entuziasme aplaŭdita, naciaj delegitoj salutis Kongreson je nomo de siaj landoj: Lemaire (belgo) Kuhne (bohemo), de Beaufront (franco), Bendigs (dano), Atila (fino), Mybs (germano), fino Schafer (anglino), pastro Guinard (hispano), Pujula (katalano), Naumann (ruso), Nylén (svedo),

Renard (sviso), Grillon (nord-Amerikano), Atanasov (bulgaro), Bicknell (italo), Ĉejka (moravo).

Ni sentis ke antaŭ niaj okuloj flugas la fantomo de pli bona estonteco, fantomo ankoraŭ tre nebula, kiu tamen de nun ĉiam pli kaj pli korpigados kaj potencigados. Tiuj Esperantistoj, kiuj apartenas al nia afero ne per sia korpo, sed per sia koro, tiuj ĉiam sentos kaj ŝatos en Esperanto antaŭ ĉio ĝian internan ideon; ili ne timos, ke la mondo nomos ilin utopiistoj; ili estos fieraj pri tiu nomo; ĉiu nia nova Kongreso fortikigos en ili la amon al la interna ideo de la Esperantismo kaj iom post iom niaj ĉiujaraj kongresoj fariĝos konstanta festo de la homaro kaj de homa frateco!»

La laborojn komencis Gaston Moch, ĝenerala sekretario, kiu konforme al la decido de la Bulonja Kongreso, raportis pri la demandoj resenditaj al la nuna Kongreso, kiujn la Komitato esploris. El ĉiuj proponoj kaj demandoj, kies nombro estis 54, nur kelkaj estis rekomenditaj al la atento de la Kongreso: pri mona helpo de riĉuloj; pri redaktado en esperanto de ĉiuj avizoj, difinitaj por internacia publiko, pri aldono sur librojn esperantan tradukon de titoloj; pri pligrandigo de niaj adresaroj per utilaj detaloj; pri presigo en ĵurnaloj de raportoj pri niaj kongresoj; pri propagando inter specialistoj; pri internacia poŝtmarko. La projekto pri elekto en diversaj urboj de esperantaj konsuloj (propono de A. Carles el Béviers kaj de la esp. klubo en Vien) estis diskutita detale kaj la kongreso akceptis unuanime.

Demandoj: pri novaj vortoj en naciaj vortaroj (Aymonnier), pri esperanta festotago (O. Simon), pri metodo de instruado de Esperanto — estis resenditaj al la Lingva aŭ la Organiza Komitatoj. La propono de G. Moch pri fondo de Konstanta Komisio de la Kongreso estis akceptita kaj oni elektis: Sebert, Michaux, Schneeberger, Mybs, Hanauer, Mudie, Moch; krom tio, speciala por ĉiu kongreso loka komitato, estis elektita la Centra Oficejo en Parizo, fondita kaj organizita en tiu ĉi jaro dank al privata helpo de eminenta Esperantisto, kiu deziris resti nekonata. Fine, la Ĝeneva Kongreso elektis Britujon, kiel lokon de la sekvanta kongreso, lasante al anglaj esperantistoj elekton de plej taŭga por tio urbo.

Dum la Ĝeneva Kongreso, Esperanto unuan fojon eniris oficiale en preĝejojn: pastro Guinart (hispano) servis meson kaj pastro Peltier faris predikon esperantan en katolika preĝejo St. François, kaj en templo « l'Auditoire » estis unua protestanta diservo de pastroj Schneeberger kaj Rust. Telegramo de Luigi Giambene, prez de Roma esp. grupo, sciigis la kongreson, ke « Sankta Patro favoranime kaj kun speciala plaĉo akceptis revuon «*Espero Katolika*» senditan al li kaj donis sian Apostolan Benon al Emile Peltier kaj la redaktoroj de tiu revuo. »

Oni diris pri la Ĝeneva Kongreso, ke la urbo komence rigardis Esperantistojn kun iom moka indiferenteco. Oni

rifuzis uzon de la urba teatro kaj de la Universitataj saloj por la kongresaj kunvenoj. Sed kiam la grandega salono Victoria-Hall pleniĝis de diversnaciaj samlingvanoj, Ĝenevanoj, sidantaj en galerioj, komence grande mirigitaj, post kelkaj momentoj jam entuziasme aplaudis la Esperantistaron. Tiu konkuro restis por ĉiam, ĉar Ĝenevo fariĝis de nun unu el ĉefaj centroj de Esperantismo.

La tria Cambridge'a kongreso komencis dimanĉon II-an de Aŭgusto 1907 per tri esperantaj diservoj: katolika kun predikado de pastro Richardson (*) kaj esperantaj kantoj, angla — en Great St. Mary's Preĝejo de pastroj A. J. Edmonds kaj R. C. Brindley laŭ preĝlibro, aprobita de la ĉefepiskopo de Ely kaj tradukita de pastro J. C. Rust; kongregacia — en Emanuel Preĝejo de Fr. Schneeberger kun prediko de pastro W. B. Selbie.

La sekvantaj tagoj oni vidis en Cambridge'aj stratoj elvokon de malnovaj pasintaj tempoj: la urbestro, St. ce en antikva sole-na robo, antaŭfrita de sceptroportisto; la « Aldermen » en siaj tradiciaj riĉaj kostumoj, kaj en malnovaj urboj kaleŝoj; Rev. Roberts, Vic. Kanceliero de la Cambridge'a Universitato, profesoroj Boirac, Cart, Bourlet en siaj universitataj roboj, gen. Sebert en akademi kostumo, anglaj, francaj, danaj, hispanaj, oficeiroj-iris renkonti Majstron en stacidomo, ornamita de tapiŝoj kaj standardoj, dum en la korto staris taĉmento de rajdistoj « Frenstersmen » en paradaj uniformoj. La alveno de Zamenhof estis salutita per esperanta himno, multenombraj sonoriloj de la Cambridge'aj preĝejoj, krioj kaj aplaŭdoj.

La malfermo de la kongreso okazis vespere en la Cambridge'a Teatro. Al saluta parolado de la Urbestro, Zamenhof respondis:

« Antaŭ tri semanoj finiĝis ĝuste dudek jaroj de la tago, kiam aperis publike la unua libro pri la lingvo Esperanto. Dudek jaroj de laborado por la esperantismo! kion tio signifas oni komprenos nur iam poste, kiam oni legos la detalan historion de la esperantismo. Multaj el vi konas la historion de la lastaj dek jaroj de la esperantismo, kiam la longe dormintaj semoj komencis doni la unuajn trunketojn; sed tre malmultaj el vi konas la historion de la unuaj dek jaroj, kiuj konsistis el senfina, ŝajne tute sensukcesa semado. La historio de la esperantismo iam rakontos al vi pri ĉiuj semantoj. Nun nia afero staras forte. Centoj da miloj da radikoj kaj radiketoj subtenas nian arbon, kiu jam ne timas la venton; ni faras manifestacion kaj propagandon por la esperantismo ne pro ia utilo, kiu ĉiu el ni persone povas havi de ĝi, sed pro tiu gravega signifo, kiun la esperantismo havas por la tuta homaro, pro tiu komune homa celo, kiu nin, aktivajn Esperantistojn,

(1) Sankta patro permesis al pastro Richardson « doni sianome papan benon post prediko kaj katolika diservo. se Episkopo konsentus »

altiris al Esperanto; ni kunvenas ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo, por havi la ĝojon vidi samideanojn, por premi al ili la manon, por varmigi en ni per reciproka renkontigo kaj kunvivo la amon kaj entuziasmon por la ideo, kiun la Esperantismo en si enhavas. Kaj tio ĉi estas la ĉefa esenco kaj la ĉefa celo de niaj kongresoj. Iom post iom Esperantujo fariĝos edukejo de la estonta interfratigita homaro, kaj en tio ĉi konsistas la plej gravaj meritoj de niaj kongresoj.

Vivu Esperanto, sed antaŭ ĉio vivu la celo kaj la interna ideo de esperantismo, vivu frateco de la popoloj, vivu ĉio rompas la murojn interla kiuentoj, vivu kresku kajĝ.

Post elekto de prezidantaro: kolonelo Pollen, presidanto Mudie, Cunningham (Angl.), Schroder (Aŭstr.), de Beaufront (Frc.), Schmidt (Germ.), Lojko (Ruso), Ahlberg (Svedo), de Saussure (Sviso), Ayza (Hispano) — vicprezidantoj, venis salutoj de diversaj landoj kaj personoj. (1) Inter la delegitoj trovis sin unuan fojon oficiala delegito de Belga registaro, leŭtenanto Cardinal, reprezentanto de la belga militista ministro. (2)

Estis sendita telegramo al la reĝo Eduardo VII, kiu tuj respondis afable, salutante la Esperantistan Kongreson. Lord Roberts, ĉefestro de angla militistaro, nomita honora membro de la kongreso, akceptis kaj dankis pro tiu honoro. Sed unu el plej entuziasmajn akceptojn la kongreso faris al la okdektrijara profesoro de la Cambridge'a Universitato, Mayor, tuĉmonde fama latinisto. Li parolis komence angle, senkulpigante, ke li nur de tri semajnoj komencis lerni E.; kelkajn tagojn poste, en la lasta kunsido, Mayor jam parolis Esperante. (3)

Dum kvar kunsidoj ĝeneralaj estis legitaj kaj diskutitaj raportoj pri agado de la Lingvo Komitato, pri la movado inter blinduloj (Cart): pri internacia monsisistemo (de Saussure); pri tutmonda festo esperantista (O. Simon), pri fondo de Esperantistujo (Wilhaker); pri loko de la sekvanta kongreso, kiun oni decidis organizi en Germanujo.

Sur la revena vojo atendis d-ron Zamenhof solena entuziasma akcepto de la Londona urbestro kaj de Londonaj esperantistoj. Sir Vezev Strong, « Alderman » anstataŭanto de Londona Lordmajor, salutante la Esperantistojn, afable konfesis, ke « se angla lingvo ne povas fariĝi internacia, ĝi estos Esperanto! »

(1) H. Fried, partoprenanto de la Haaga Pac-konferenco sendis telegramon: « De la nepaca konferenco en Haag korajn slautojn al la vera paca konferenco en Cambridge. »

(2) La organiza Komitato invitis ankaŭ aliajn registarojn: Portugalujo, Svisujo, Hollandio, Meksikujo, Monakio, respondis nee, aliaj ne respondis.

(3) Mi vidis — diris li, — Pentekostan miraklon: scio de fremdaj lingvoj donita al plej modestaj homoj... Ovidius Naso nun jam ne povis skribi: » Barbarus hic ergo sum, quia non intelligor illi », ĉar post kelkaj horoj li estus povinta ekkrii ĝoje: « non sum barbarus, intelligor omnibus ».

Belan kongreson organizis unu jaron poste la « *Kvaro por Kvara* » (1) : dro Mybs, dro Schramm. Mario Hankel kaj Arnhold en Dresdeno (15-22 a. de Aug. 1908). Tiu kongreso sukcesis la unua ricevi protekton de la Reĝo Frederiko-Augusto de Saksujo. En la honora prezidantaro ni trovas ankaŭ nomojn de Dro Beck, saksa ministro de publika instruado ; Beutler, ĉefurbestro de Dresdeno ; Grafo v. Hohenthal und Bergen, ministro de eksteraj aferoj ; von Metsch-Reichenbach, ministro de la reĝa domo ; von Eriegern, ĉambelano ; ĝeneralo v. Hausen, milita ministro, multaj profesoroj, parlamentanoj, urboj delegitoj.

Oficialaj reprezentantoj estis : Ŝimura, oficiala delegito de la ministro de Instruado de Japanujo ; Straub, oficiala delegito de la Registaro de Usono ; Yemans, oficiala reprezentanto de la Filipina registaro ; Pujula, oficiala reprezentanto de la Provinca Deputitaro de Barcelono ; Adolphe Moynier, oficiala delegito de la Internacia Komitato de Ruĝa Kruco ; Gaston Moch, oficiala delegito de la Internacia Oficejo de Paco. (2)

La urbo Dresdeno donis al Esperantistoj oni povas vere diri : ĉion, kion ĝi posedas, komencante de siaj tramveturiloj, vapor-ŝipoj, urbdomoj, preĝejoj, reĝaj Teatroj, Lernejon kun 80 saloj kaj ĉambroj, sian grandegan « Vereinshaus » sian Ausstellungs-park, — kaj malavaran, monan subvencion por la organiza komitato. La urbanoj de sia flanko faris ĉion por provi siajn simpatiajn sentojn : dum Elbaj veturadoj, la bordoj de la rivero, la urbaj kaj reĝaj palacoj, sennombraj privataj domoj — laŭ kelkaj kilometroj — estis ornamitaj de esperantaj standardoj kaj vespere lumigitaj. Laboristoj salutis nin per krioj « Vivu Esperanto » kaj per premmanoj, policanoj, parolantaj esperante, afable proponis siajn servojn. Diservoj en katolikaj preĝejoj, de pastroj Richardson kaj Pichot, paroĥestro el Monako, kaj en luteraj preĝejoj, de dro Kuhn sur temo el Mateo 11, 10. : Vidante la stelon, ili ĝojigis » — komencis la unuan tagon.

Prezidantaro de la Kongreso konsistis el ; Dro Mybs, prezidanto ; Schramm, Arnhold, S-ino Hankel — Viceprezidantoj ; G. Moch, Gabriel Chavet, de Ladevèze kaj S. Winkelmann — Sekretarioj kaj 54 naciaj delegitoj.

Post la malfermo, la oficialaj reprezentantoj : Lange, repr. de la reĝa ministro de la internaj aferoj, kaj Beutler, ĉefurbestro de la urbo, salutis la kongresanojn. Tuj poste Zamenhof

(1) Alfred Michaux, organizinto de la unua Bulonja Kongreso, estis nomita « La Unu por la Unua. » — ĉiuj postaj kongresoj sekvis tiun modelon. En Genevo la loka Komitato konsistis el Schneeberger kaj Renard : « La duo por la dua » ; en Cambridge — « La Trio por la Tria » : Pollen, Cunningham, Mudie sekve por la Dresdeno Kongreso estis kreita « Kvaro por la Kvara. » k. t. p.

(2) La registroj de Britujo, Holandio, Monako, Kubo, Siam, Svisujo kaj Usono, respondis al invito de la konstanta kongresa komitato, ke ili ne povas sendi delegitojn.

komencis sian kutiman malferman paroladon, kiun li finis per tiuj ĉi vortoj : » Esperanto estas nenies proprajo, la esperantistoj havas plenan rajton fari kun ĝi ĉion, kion ili volas, se ili nur faros ĝin singarde, lojale kaj interkonsente, nur por gardi nian Lingvon kontraŭ anarĥio de la flanko de apartaj personoj ; nia lingvo havas sian plej senpartie elektitan kaj el plej kompetentaj personoj konsistantan Lingvan Komitaton, kiu, dependante de neniuj mastro, havas plenan rajton kaj plenan povon esplori kaj prezenti al la sankcio de la esperantistaro ĉion, kion ĝi volas. La Bulonja Deklaracio malpermesas nur, ke apartaj personoj rompu la lingvon *arbitre* ; ĝi estas kreita nur por gardi la ekstreme necesan *continuecon* en nia lingvo. Se iu el vi trovos, ke ni devas fari tion aŭ alian, prezentu vian deziron al la Lingva Komitato. Se tiu Komitato ŝajnos al vi tro konservativa, tiam memoru, ke ĝi ekzistas ne por la plenumado de diversaj personaj kapricoj, sed por la gardado de la intereso de la tuta esperantistaro : ke pli bone estas, ke la Komitato faru tro malmulte, ol ke ĝi facilanime faru ian paŝon, kiu povus malutili al nia tuta afero. »

La laboraj kunsidoj okupis 4 kunvenojn : 18an, 19an, 21an, 22an de aŭg en grandega salo de Vereinshaus aŭ en Teknika Lernejo. Post kutimaj salutaj paroladoj de naciaj reprezentantoj je nomo de iliaj landoj (41 nacioj estis reprezentataj).

Inter aliaj ; Irlandio, Islandio, Katalunujo, Finnlando, Rusujo, Brazilio, Hindujo, Ĉilio, Tunizio, Meksikio, Urugvajo, Usonio.

La kongreso priparolis kaj decidis :

Sendi telegramojn al la Germana Imperiestro, al la Reĝo de Saksujo, al grafo Tolstoj, al Alfred Michaux (la Imperiestro kaj la saksa Reĝo respondis per telegramoj).

Aprobi la raporton de la Konstanta Komitato de la kongreso ; aprobi projekton pri Kongresa Kaso, proponitan de la Konstanta Komitato (oni elektis kuratoroj : Mudie, Mybs kaj gen. Sebert) ; aprobi post raportoj de Privat kaj de la Asocio de instruistoj, proponon pri Internacia Atesto pri kapableco (G. Moch) ; aprobi fondon de Oficiala Gazeto Esperantista kiel organo de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Kongresa Komitato ; resendi al U. E. A. proponon pri fondo de Esperanto—Domoj por junuloj (Privat) : aprobi fondon de Instituto de Esperanto por organizo de normalaj lernejoj kaj por diplomoj ; forigi demandon, diskutitan jam sen rezultato de Geneva Kongreso, sed malfacile solvotan pri esp. festotago (O. Simon) kaj demandon pri esperanta neŭtra lando (Roy) (1) ; aprobi raportojn de la Lingva Komitato, de la

(1) S. Roy proponis elekti urbeton Moresnet, malgrandan landon, kuŝantan inter Belgujo, Germanujo kaj Holando, sed plene neŭtran ne enigitan en neniuj de tiuj ĉi regnoj. — kiel neŭtra lando por esperantaj komercaj, sciencaj k. a. institucioj. Esperantiginte la loĝantojn ni tiamaniere estus kreontaj kvazaŭ esperantan memstaran staton. Tiu ĉi projekto ŝajnis tamen al multaj Esperantistoj iom danĝera pro sia politika karaktero.

Akademio kaj de la Int. Scienca Asocio, aprobi proponon de fondo de speciala societo por helpi al la agado de la Centra oficejo (Chavet); aprobi proponon, ke la lokaj Kongresanoj portu specialajn signojn, kiel interpretistoj (G. C. Moch); akcepti proponon pri reorganizo de la Konstanta Komitato, kiu de nun konsistos el prezidanto, ĝenerala sekretario, 2 membroj de ĉiu kongreso estanta, 2 de la antaŭa kaj 2 de la estonta — tiuj ĉi lastaj elektotaj de la loka organiza Komitato. Estis elektitaj: Sebert, prezidanto, kol, Pollen, Mudie — por la Cambridge'a Kongreso, Mybs, Schram por la Dresdena, G. Moch — ĝenerala sekretario.

Oni decidis fine organizi la sekvantan Kongreson en Ameriko (laŭ invito de Farman) kaj samtempe duan en Hispanujo (invito de Pujula, Kataluno kaj de Perigordo, Hispano).

Post la Kongreso multaj esperantistoj laŭ invito de Bohema Esperantista Unio vizitis belan, « oran » Prahon, ĉefurbon de Bohemujo, aliaj Berlinon. En ambaŭ urboj ili estis kore akceptitaj de esperantistoj. En Berlino la ministro de publika Instruado akceptis, kiel reprezentantojn de Esperanto: d-ron Zamenhof, d-ron Mybs, gen. Sebert, prof. Boirac, d-ron Kroita, Moscheles, kol. Pollen, Van der Biest, Frenkel, Sabadell, d-ron Ostrovski, Sandström, — kaj priparolis kun ili demandojn pri Esperanto en lernejoj.

La kvina kongreso estis organizita en Barcelono de la Loka Komitato: Fr. Pujula y Valles, prez.; Alf. Sabadell, vicepr., Gayet, Balselles, kasisto; Germaine Rebours de Pujula, sekretariino; D-ro Bremon Masgrau, R. Claramunt, Sales Balmes, C. Bourlet.

En la patronaro de la Kongreso ni vidis Alfonson XIII, reĝon de Hispanujo, Karolon de Burbon, A. Maura, prezidanton de la Ministraro, ministrojn, provinc-kaj urbestrojn, profesorojn, redaktorojn k. a.

Krom tio, Manuel Allendè Sallazar, ministro pri eksterlandaj aferoj, de Hispanujo, per ĉiuj Hispanaj ambasadoroj invitis ĉiujn registarojn sendi oficialajn delegitojn al la Barcelona Kongreso. Al tiu invito respondis favore la registaroj, kies delegitoj estis: Van der Biest-Andelhof kaj Oscar Van Schoor (Belgujo), Francisco Lopez de Augusta (Meksikio), Schybbie (Norvegujo), Herbert Harris, Edwin Reed, (Usono). Kiel oficiala delegito de societoj, ĉeestis Wicart — de la konfederacio de komerco kaj industrio de Francujo.

La urbo Barcelono oferis al la Kongreso monan helpon da 2500 pesetoj, la rektoro de la universitato — plenan liberan uzon de la universitata palaco, la komerco ĉambro — belega salo de la Borso.

La oficiala malfermo okazis la 6an de septembro 1909 en la Barcelona Palaco de Belartoj. D-ro Mybs, prezidanto de la antaŭa kongreso malfermis la kunsidon, proponante elekti kongresan

estraron. Estis elektitaj Pujula y Valles, prezidanto; Perigordo, Sabadell — vicprezidantoj; G. Chavet, Sino Germaine Rebours de Pujula — sekretarioj, kaj 38 — naciaj delegitoj. (1)

Telegramoj estis senditaj al la Reĝo Alfonso XIII. (2) al princo Karlo de Burbon, al ĉiuj Ministroj, al la reĝo de Sakso, kiel protektanto de la kvara Kongreso. Post la malfermo Sairet, urbestro de Barcelono kaj naciaj delegitoj salutis la kongresanojn. Oficiale aliĝis al la Kongreso: urboj — Carcagente, Sant Esteba, Terrassa, Valencia, Vilanova y Geltru; societoj: Instituto Catalan de les arts del libre; Unio Catalanista; Akademia de Farmaceutich; Ateneo enciklopedich populare; Societo Catalanuya Vella de Sabadell; Societat Vegetariania de Barcelona; Societat de atraccio de Forasters; Societat protectora d'animals; Akademio de Medicina. En la kongreso partoprenis ĉirkaŭ 1300 Esperantistoj.

Dum kvar laboraj kunsidoj (6. 9. 11 de Septembro) estas priparolitaj demandoj:

Pri propagando, Mann, Blaise, Mudie, Cart, Allende, Privat faris interesajn komunikadojn; insignojn esperantajn prezentis Centra Komercujo por Esperanto; la grupo de Godesberg raportis pri sia intenco krei konstantan restadejon por esperantistoj; pri esperanta gazetaro parolis, Beck, Chavet.

La propono, ke esperantistaj diverslandaj societoj elektu, per proporcia balotado, Internacian Konsilantaron, kies celo estos zorgi pri financaj rimedoj de la Lingva Komitato kaj de la Akademio, estis aprobitaj; estas esprimita deziro, ke la Biblia Brita Societo eldonu esperantan tradukon de la Sankta Skribo; fine, — estas deciditaj landoj por la du sekvantaj kongresoj: por 1910 — Usono, por 1911 — Belgujo. Por tiu ĉi lasta kongreso oni elektis membroj de la Komisio: Van der Biest, kaj Oscar Van Schoor.

Post la kongreso, Zamenhof kaj multaj kongresanoj, laŭ invito de la prezidanto de la esper. Societo en Valencia, Inglada, vizitis tiun ĉi urbon.

(1) Novaj el: Kosiñhinujo, Peruvio, Argentino, insulo Samos: el Hispanujo apartaj de Astura, Kataluna, Kastila, Valencia, Vaska lingvoj: el Bosnio, Dalmatio, Gibraltario, Turkujo, Maltio. —

(2) Jen teksto de la respondoj: « Komandanto de Halebardistoj al Ĝeneralestro de Katalunujo: Moŝto la Reĝo dankas alablecon kaj sendas estiman saluton al d-ro Zamenhof kaj fremdaj esperantistoj. » Krom tio propramova telegramo de la reĝo Alfonso XIII: « de la Privata Sekretario de la Reĝo: Moŝto la Reĝo ordonos al mi esprimi al vi kaj al Kongresiano varman dankon pro afabla telegramo. » De la Ministro: « la Registaro de la Reĝo dankas la atablan saluton kaj sendas dezirojn por la efikeco de la kongreso al kulturo kaj paco inter homoj » Zamenhof estis nomita Kavaliro de la ordeno de Isabelo Katolika.

En la sekvanta jaro, respondante al invito de Usonaj Esperantistoj, — niaj plej fervoraj kaj — disponantaj libere sian tempon — samideanoj enŝipiĝis kuraĝe por trapasi Oceanon. Multaj dubis pri la sukceso de Kongreso en Usono, sed, kiel ni vidos, kvankam malpli multenombra, la Kongreso laboris laŭ modelo de eŭropaj kaj atingis plene sian celon, diris Zamenhof en sia malferma parolado.

« Lando de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas. Lando pri kiu revis kaj nun ankoraŭ revas multaj suferantoj kaj senkulpaj persekutatoj, mi vin salutas ! Regno de homoj kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi, kaj mi estas feliĉa, ke la sorto permesis al mi vin vidi, kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniu monopoligitan aeron ! Saluton al vi, Usono, plej potenca reprezentanto de la nova mondo ! Ni venis, por alporti novan kuraĝon al tiuj niaj samideanoj kaj samidealanoj, kiuj ĝis nun laboris inter vi, kaj kies vortoj pri ia nova popolo eble ŝajnis al vi tro fabelaj. Peco de tiu miksidevena kaj tamen lingve kaj kore unuigita popolo nun staras antaŭ vi reala kaj vivanta. Al tiu nia laborado, kiu celas krei iom unuigitan, sekve fortigitan kaj spirite altigitan homaron, ni nun invitas vin, filoj de Usono. Kaj ni esperas, ke nia voko ne restos vana, sed ĝi baldau eĥos resonos en ĉiuj anguloj de via lando kaj tra tuta via kontinento. Antaŭ vi, praktikaj Amerikanoj, mi volas analizi alian demandon, nome : ĉu ni kun nia laborado staras sur vojo tute certa, aŭ ĉu ni povas timi, ke iam nia tuta laborado montriĝos vana ?

» La celo, por kiu ni laboras, povas esti atingita per du vojoj ; aŭ per laborado de homoj privataj, t. e. de la popolaj amasoj, aŭ per dekreto de la registaroj. Plej kredeble nia afero estos atingita per la vojo unua ; sed ĉiu komprenas tre bone, ke laborado de amasoj povas ĝin konduki al celo nur tiam, se ĉiuj laboras unuanime. La esperantistoj laboris dum longa vico da jaroj, multe laboris, multe oferis kaj kun tre granda malfacileco fine akiris tion, kio dum multaj miljaroj ŝajnis neakirebla kaj kio, unu fojon perdita, neniam plu reakiriĝus, ĉar la mondo perdis la tutan konfidon al la internacilingva ideo. Sekve, ĉiu prudenta komitato dirus al si : ni devas esti tre singardaj, por ke, anstataŭ akceli la aferon, ni ĝin ne pereigu per ciam.

» Ni povas labori trankvile ; ni ne devas malĝoji, se nia laborado estas iafoje tre malfacila kaj sendanka ; sur nia flanko estas ne sole la fajro de niaj sentoj, sur nia flanko estas ankaŭ la nerefuteblaj legoj de la logiko kaj prudento. Al la Sesa Esperantista Kongreso, kiu sendube enjetos multe da semoj en la teron Amerikan, mi eldiras mian koran saluton. »

La solena malfermo de la Kongreso okazis en Washington, 15-an de Aug. 1910. Malfermis ĝin, laŭ kŭtimo, la prezidanto de la antaŭa Kongreso — kapitano Perigordo. En la estraro estis

elektitaj : J. J. Barrett, prezidanto ; D-ro Yemans kaj d-ro Ivy Kellerman-Reed, vicprezidantoj ; Gabriel Chavet, Ed. C. Reed — sekretarioj ; Mann, Rollet de l'Isle, Mybs, Perigordo, naciaj vicprezidantoj kaj 30 naciaj delegitoj. (1)

Oficialajn reprezentantojn alsendis 16 registaroj : Brazilio, Ekvatorio, Gvatemalo, Hinujo, Hispanujo, Honduras, Kosta — Rikio, Meksikio, Persio, Rusujo, Urugvajo, departamentoj de la tera kaj marista militistaro de Usonio, ŝtatoj Karolinio, Floridio, Luisiana, Oregonio. Oficiale reprezentitaj estis ankaŭ : la Amerika Ruĝa Kruco, ia Internacie oficejo de Amerikaj Respublikoj. Neoficiale : la departamento de internaj aferoj de Usono, kaj la Rusa ministrejo de komerco kaj industrio kiu komisis delegiton raportinton. Salutita per telegramo, la prezidanto de Usono, Taft alsendis » plej bonajn dezirojn por la sukcesoj de la Kongreso. » La Amerika Federacio de laboro, Katolika Esperantista Unuiĝo, Universala Ligo, Teosofia Asocio, Baha movado — salutis Kongreson per siaj neoficialaj reprezentantoj.

Dum kvar laboroj kunsidoj (15, 17, 20 de Aŭg.) oni priparolis kaj decidis : resendi al la Lingva Komitato proponon de Holanda Societo, ke la Lingvkomitatoj estu elektitaj de la naciaj societoj ; aprobi rezolucion de Usona Kongreso de Paco nomi internacian komision por celoj de universa paco.

Pri la propono de Twombly kaj Scott : nomi la nunan Kongreson — naŭa, ĉar antaŭ niaj kongresoj okazis jam tri kongresoj de volapukistoj, — kaj sendi esprimon de respekto al Schleyer, aŭtoro de Volapuk, — la kongreso decidis, ke kvankam Schleyer ĉiam havis estimon de Esperantistoj, tamen hodiaŭ ne ekzistas sufiĉa preteksto por akcepti tiujn proponojn.

La raportoj de la Konstanta Komisiono, de la Lingvo Komitato, de la Akademio, de la Scienca Asocio — estis aprobitaj. La Kongreso esprimis dankon al la prezidanto de la Aga Komitato de Universa Ekspozicio en New-York 1913, kiu invitis Esperantistojn interesi pri ilia afero Kongreson de reprezentantoj de ĉiuj parlamentoj, kiu estos organizita en 1913.

La Kongreso esprimis deziron, ke landoj, kiuj ĝis nun ne elektis delegitojn al Internacia Konsilantaro, fondita dum la antaŭa Kongreso, faru tion eble plej frue kaj ke la elektitaj Konsilantoj tuj komencu sian laboron, uzante Oficialan Gazeton por publikigi siajn komunikaĵojn.

Pri loko de estontaj Kongresoj estis prezentitaj diversaj invitoj : el Rusujo, el Krakovo por 1912, el Italujo por 1913, el Parizo por 1914, el New-Orleans kaj San-Francisko por 1915 : la Kongreso resendis ĉiujn proponojn al esploro de la Konstanta Komisiono.

(1) Aŭstrio, Kroatio, Britujo, Skotujo, Irlandio, Kimrio : Francujo, Germanujo, Gibraltario, Hispanujo, Maltio : Rusujo, Litovujo, Polujo : Svisujo, Hindujo, Sudafriko, Brazilio, Kanadio, Meksikio, Ĉilio, Porto-Rikio, Peruvio, Urugvajo, Usonio, Filipinaj insuloj, Australio.

Fine, kapitano Postnikov, petis sendi al li informojn kaj sciigojn por raporto pri la Kongreso, kiun li devas fari al la ministro de industrio kaj komerco en Rusujo. (1)

Dum ĉiuj kongresoj estis organizitaj festoj, el kiuj, ni ne povas forgesi en tiu ĉi kroniko de la esperanta movado, kelkajn notindajn faktojn.

En Dresdeno post la oficiala Kongreso estis aranĝita « Festo de la Revuo ». monata gazeto, bonege redaktita de prof. G. Bourlet, okupanta unu el honoraj lokoj en nia gazetaro. En Jaro 1908 « La Revuo anoncis tri konkursojn : por la plej bona epilogo al noveleto : » Ĉu virgulino, ĉu tigro' de Stokton, — rakonto kvazaŭ interrompita en sia plej interesa momento ; dua konkurso konsistis en elekto per voĉdonado de la legantaj de la Revuo — de plej bona post Zamenhof esperanta stilisto kaj de lia plej bona verko ; la tria konkurso estis difinita por la plej bona verskvaro. Dum la « Festo de la Revuo » estis publikigitaj la rezultatoj : en la unua konkurso estis premiita — d-ro S. Krukowski (Varsovio) ; en la dua — plejmulton da voĉoj ricevis d-ro Kazimierz Bein (Varsovio) kaj lia traduko de « Faraono » de B. Prus ; ambaŭ laŭreatoj estis Poloj kaj la verko premiita estis ankaŭ verko de Pola aŭtoro. Pro tio kelkaj nomis Dresdenan kongreson — Polan tagon en Esperantujo : el 9 elektitaj akademianoj 2 estis Poloj : Bein, Vicprezidanto, Grabowski, direktoro de la gramatika komisiono. Unu el la ĉefaj herooj de la kongreso estis sendube Emanuel Reichel : li ankaŭ estis naskita en Pola ĉefurbo Krakovo. La unua monarka, kiu oferis al esperantista kongreso sian altan protekton, Frederiko-Aŭgusto, reĝo de Saksujo, estas pranevo de la lasta polo reĝanto, ankaŭ Frederiko-Aŭgusto, grandprinco de Varsovio ĝis 1815 ; liaj avoj reĝis en Polujo preskaŭ dum la tuta XVIII jarcento, ankaŭ du Frederikoj Augustoj IIa kaj IIIa (1703-1772). En Dresdeno unuan fojn kunvenis Polaj Esperantistoj el ĉiuj tri regnoj : Rusujo, Austrio, Prusujo... tio estis ankaŭ malnova tradicia kutimo. Ĉar ankaŭ en Dresdeno kunvenis multfoje Polaj elmigrintoj el ĉiuj partoj de Polujo kiuj tie trovis rifuĝon dum polaj revolucioj... Interesa kuntrafo de cirkonstancoj.

En la tria konkurso estis du laŭreatoj : prof. P. Christaller — (Stuttgard), L. Elb (Koĉenbroda).

(1) Ni notu ankoraŭ, ke la nombro de enskribitaj kongresanoj estis 357 : el 35 statoj de Usono 274, el Sud — Ameriko — 10, el Kanadio — 5, el Afriko — 2, el Aŭstralio — 2, el Ĥinuĵo — 2, el Francujo — 17, el Angluĵo — 14, el Hispanujo — 9, el aliaj eŭropaj landoj — 22.

EDWARD JORIS

ĜENERALA LIBREJO " 't KERSOUWKEN "

Ĉiam grandege provizita je Esperantaj Literaturajoj. Liveras en la spaco da 24 horoj ĉian ajn libron.

DE VOORLOOPER

Plej nova kaj plej perfekta metodo por memlerni Esperanton en kelkaj semajnoj, sen profesoro.

St Jacobsmarkt, 66, ANTWERPEN

BURĜA BIERFAREJO
H. VAN MEERBEECK
Sterlingerstr., 126-128
BORGERHOUT

Bareloj. Litroj	1/1	1/2	1/4
	160	80	40
Triobla hordea	42	21	11
Duobla hordea	30	15	8
Hordea	22	11	5,50
Duonhordea	16	8	4
Blanka biero	14	7	3,50

En boteloj

Duobla hordea 0,25 Tabla biero 0,12
Ekstra hordea 0,15 Duobla blanka 0,12

La boteloj estas la propraĵo de la Bierfarejo ; ili povas esti nek acetataj, nek vendataj, nek plenigataj. 26

Likvorvendejo

—o—o—o—
C. VINCK
24, VONDELSTRAAT, 24.
ANTWERPEN

—o—o—o—
Specialaj kaj bongustaj likvoroj
—o—o—o— 21
Esperanta Likvoro

SAMIDEANO

Jus aperis :

PAŬLO DEBĤNHAM

Originale en Esperanto verkita

Romano, 227 paĝoj 80 S. 1.150 aŭfrankite
British Esperanto Association 133 136
High Holborn London W. C.

Universala Esperanta Librejo

10 Rue de la Bourse

Genève, Svisujo 5

HOTELO
Café du Commerce
GENT —o— GAND
FLANDRA STRATO 79
(proksime de la Suda Stacidomo)

J. Claeys-Hebbelincx

Ĉambroj por vojaĝantoj
Varmaj
kaj malvarmaj manĝaĵoj
Tagmanĝoj

19
TELEFONO 908

KAFEJO 25
« Witte Leeuw »
POSEDANTO
CH. DEELEN
— TELEF. 1949 —
Kunveno por esperantistoj
KUNSTLEI, 4. — Antwerpen.

Libropresejo — Litografajo —
Librobindejo
Esperantaj Presaĵoj
— Fermo fondita en 1868 —

JOS. DIRIX KAJ FILO
Markgravestraat, 11-13
20 ANTWERPEN

HOTEL DE COLOGNE

Poscedanto : A. VINKEN,
— 53, de Keyserlei, 53 —
ANTWERPEN

—o—
Ĉambroj kun matenmanĝo
de fr. 3,50.

Disvendado de la fam-
konataj bieroj
Dortmund (Union) kaj
Munĥeno 15
— (Augustiner Brau) —

LA FIRMO
L. GEVAERT & C°
OUDE GOD (BELGUJO)

starigis

Grandan Internacian Konkurson

por la plej belaj fotografajoj faritaj sur ĝiaj diversaj

Foto-Paperoj.

Por tiu konkurso ĝi donacos

Frankojn 25000

en monpremioj.

La tutlasta templimo por alsendo de la fotografajoj
estas fiksita je la **15-a Oktobro 1912**

Mendu la libreton kun kondiĉoj de la konkurso.

Edm. BASTYNS

29, Huidevetterstraat 29
ANTWERPEN

FOTOGRAFILOJ JE ĈIUJ
PREZOJ KAJ DE ĈIUJ
FABRIKEJOJ.


Ĉiuspecaj fotografplatoj. Platoj Marion. Ĉiuspecaj paperoj
Bromidaj kaj por taglumo. Ĉiuj aliaj necesajoj je la plej
profitaj prezoj.

Senpaga instruo pri la uzado de la fotografiloj, pri la
diversaj operacioj de la fotografarto.

Fidindega Firmo. — Prezoj malaltaj. 23

CIGAROJ
MELIOR

Ernest
TINCHANT



La plej

imititaj, do la plej

bona!


14

GRANDA

Internacia Ekspozicio

en **GENT** (Belgujo)

Majo-Novembro 1913



Vasteco 115 hektaroj. Haloj kovritaj
14 hektaroj — Festpalaco 3 hektaroj

Esperantistoj !

Vizitu la Ekspozicion dum la Esper-
anta Semajno-Septembro 1913.

Antaŭ ol aĉeti viajn **Vinojn, Likvorojn, Gasajn Akvojn** aŭ
Anglajn Bierojn turnu vin al la firmo

H. J. Bridges,
L. Schumacher, posteulo

Rue Lozane, 219-221, Lozanastraat, Anvers-Antwerpen.

Sola fabrikanto de la "Eliksiro Esperanto"

Prezo de unu botelo : Fr. 2,50 = 1 Sm. 1

Presejo "DE VLIJST"

NATIONALESTRAAT, 54,


ANTWERPEN



Presejo de **BELĜA ESPERANTISTO**



Akceptas ĉiujn **ESPERANTISTAJN** prestaborojn



RAPIDE ---- **ZORGPLENE**

MALALTAJ PREZOJ



■■■■ **Telefono 2214** ■■■■ 13

La Siropo de l'Abatejo S-ta Paulo

estas la sola radikala kaj nemalutila sanigilo por **TUSO KOKLUSO, MALVARMUMO, LARINGITO, BRONSITO, INFLUENZO, ASTMO, PLEŬREZIO, MALARIO, KATARO, GORĜDOLORO** kaj ĈIUSPECAJ MALSANOJ de la **BRUSTO, PULMOJ** kaj **SPIRORGANOJ**.

Prezo : 1/4 botelo Fr. 2,25 ; — 1/2 Fr. 4 ; — 1/1 Fr. 7

Centra tenejo : L. J. AKKER, 2
ROTTERDAM (Holando).

Aĉetebla en la farmaciejo **E. CUVELIER,** Strato Potgieter, 3. Antwere